

# BEOGRADA VERDA ESTILO

Jaro IV

Beogrado, majo-aŭgusto 2009

n-ro 2(9)

Okaze de la dua kongreso de serbiaj esperantistoj

## PROPAGANDO DE ESPERANTO

Kongreso en Jagodina okazis kaj pasis. Ĉu ni, serbiaj esperantistoj, por tiu kongreso donis validajn fruktojn? Ĉu nombro de esperantistoj grandiĝis? Ĉu jagodinanoj eksciis pli pri la internacia lingvo? Ĉu kongreso helpas al la bona laboro de jagodina esperanto-societo "Sreten Aĝić"?

Ni timas, ke tiu tasko ne estis plenumita.

Esperantistoj ekkonis urbon Jagodina. Tio estis bela urbo, pura, interesa, kun kelkaj neordinaraj objektoj kaj muzeoj, urbo kiu disvastiĝas. Hotelo, kie okazis la kongreso estis tre korekta. Okazis solena malfermo de la kongreso, kie ĉeestis malmulte da neesperantistoj. Organizantoj ne preparis prelegon pri Esperanto por civitanoj, neesperantistoj. En urbo ne estis apartaj reklamoj, informoj pri la kongreso. Loka gazeto aperigis mallongan tekston pri la Esperanto-societo kaj pri la kongreso.

Venontjara kongreso okazos en Beogrado. Tasko de beogradaj esperantistoj estas kaj estos: informi civitanojn pri la internacia lingvo, organizi kursojn, prepari prelegojn pri Esperanto...

Ni esperas, ke la tria kongreso estos pli bona, en tiu kampo, ol la dua.

La redakta komitato

Eldonas Esperanto societo „Radomir Klajić“, Terazije 42, Beogrado  
Eldonata surpapere kaj sur kompakta disko (CD) kiel Word-dokumento  
Prezo: 70 din. unu ekzemplero, 200 din. jarabono (sendokostoj ne enkalkulitaj),  
sendepende ĉu surpapere aŭ sur kompakta disko  
Por eksterlando unu ekzemplero 2 €, jarabono 6 € (plus sendokostoj)  
Aperas trifoje jare

---

**Ĉefredaktoro:** d-ro Miodrag Stojanović, **Redakta komitato:** d-ro Pribislav Marinković, Zlatoje Martinov, Agnesa Eremija, Mirjana Šundeke, Etelka Kiš-Jakupović, Tereza Kapista, Nedeljka Ložajić, Slavica Stoilković, Branko Despotović, Dimitrije Janičić, m-ro Gvozden Sredić, Velibor Simović, Milan Olbina, **Teknika redakto:** Adem Jakupović

# Originala prozo

Bora SIMOVIĆ

## FENOMENO DE ARO

Ekzistas diversaj aroj:

- brutaro de ŝafoj,
- grego de bovoj,
- grego de lupoj,
- grupo de simpatiantoj de iu sporta teamo,
- dependantoj de nacio aŭ ŝtato,
- etna aro,
- k.t.p.

### 1-e Aro hazarda

Mi spertis ĉi tion. Kiam mi venis proksime de la placo proksima de la stacio de urba aŭtobuso – unu grupo kruele batis unu viran personon. Mi preteriris por ne rigardi malbonan okazaĵon, sed mi tuj konkludis ke min persekutos ĝis la tombo la impreso pri tiu okazaĵo ĉar mi nenion provis por ĉesi la perforton.

Mi revenis, staris proksime de ili, riskante ke ankaŭ mi estos la sekvanta viktimo. Mi tiam opiniis, ke tio estos por mi malpli terura ol menciita persekuto de mia konscienco.

Ili tuj ĉesis malicagon, kaj direktis la atenton al mi.

Mi tiam demandis tiom pacience, kiom mi kapablis:

- Kion vi faras?

Ili min ĉirkaŭis kaj senkulpiĝis dirante ke ili kaptis lin kiam li provis forrabi damsakon de unu ino. Li, ankaŭ, praviĝas ĉar li loĝas en azilo por malriĉuloj kaj lia frato estas en malliberejo, kaj li deziris ion porti al sia frato.

Ili rakontis ĉiu sian propran mensogon.

Mi tuj komprenis ke ili ĉiuj ekestimis min kiel la kialon ĉesi tute neagrablan agon, kaj mi plensilentis mian mensogon. Mi tuj transformiĝis kaj mi ekkondutis kiel iu tribunano. Tial mi turnis al batita homo, sangomakulita, proksimume ĉi tiel:

- Kiel tio al vi bezonis? Ĉu vi vidas kiel vi ankoraŭ povos suferi?

Ni ĉiuj disiĝis eble feliĉaj ĉar tio ne daŭros pli terure.

Ili estis iu aro de la vojaĝantoj kiuj hazarde estis kune en iu urba aŭtobuso kaj ili eliris en la stacio proksime de menciita placo. Ili disiĝis kaj, eble, poste neniam renkontis.

(Daŭrigota.)

## **2-e Brutaro, grego**

Kiam mi estis juna paŝtisto, mi paŝtis kaj superregis kutime brutaron de ŝafoj. En tiu tempo ekzistis stalinisma Sovetunio. Samtempe – mi legis Odiseon, kie oni mencias virŝafon – ĉefgvidanton kiun „sekvas la tuta brutaro“. Mi neniam vidis ion tian. Laŭ mia sperto – se ekmovos iu membro de la brutaro, sendepende kiu estas tiu – aŭ plej granda virŝafo, aŭ plej malforta ŝafido – la tuta brutaro sekvas ĝin.

Mi kutimis puni tian „gvidanton“ tiel – ke mi starus inter ĝi kaj la resto de brutaro, kaj malpermesus al ĝi – reveni en la brutaron. Tiu provus reveni ĉirkaŭmante min, sed mi moviĝus tiel ke mi ĉiam estus inter ĝi kaj la brutaro. Se tiu provus rapidkure ĉirkaŭiri al la grego, tiam ĝi devus kuri trapasante multe pli longan vojon ol mi. Tiel ĝi laciĝus multe pli ol mi.

Mi neniam supozis ke ankaŭ mi iam estus tiel punata – ke, al mi estus malpermesata – veni al iu kiu al mi enhavas tre gravan signifon.

En la sama tempo mi trovis, en humura gazeto nomata „Jeĵ“ (=erinaco), unu karikaturon, kiun mi neniam forgesos. En iu sovetunia urboplaco, plena de aplaŭdanta popolo, iu persono demandas iun el aplaudantaj – kial ili aplaŭdas? Tiu respondas ke iu persono kriis: „Vivu Stalin!“ – kaj nun neniu kuraĝas ĉesi la unua. Ĉiu timas esti suspektinda kaj eble forigita en Siberion.

Mi dolĉe, eĉ moke, ekridis.

Kelkajn jarojn poste – mi estis delegito en iu landa konferenco de Jugoslavio. Multaj personoj diskutis. Eĉ mi iom diskutis.

Kiam iu diskutanto menciis la nomon de Tito, tiam iu persono kriis: „Vivu kamarado Tito, plej bona filo de ĉiuj frataj popoloj de Jugoslavio!“ Preskaŭ ĉiuj ĉeestantoj ekstaris kaj aplaŭdis kriante: “Vivu! Vivu!” Mi, ankaŭ ekstaris kaj aplaŭdis. Mi ne timis Siberion, sed – mi min sentis parto de tiu „nedisigebla“ aro de la personoj el ĉiuj partoj de Jugoslavio. Mi tiam ne povis imagi ke ekzistas iuj partoj de „niaj popoloj“ kiuj dezirus apartiĝi. Eĉ nun mi opinias ke ĉiam plimulto neniam deziris tion, sed aperis iuj „skabiaj ŝafidoj“. Mi tion ne asertas, sed – mi nur opinias.

(Daŭrigota.)

## **Sportaj simpatiantoj kaj „muzikaj“ ĝuantoj**

Tiujn fenomenojn mi abomenas, sed ili, bedaŭrinde, ekzistas tute amase.

Ambaŭ estas konkuraj aferoj celantaj fari pasiajn idiotojn, kiuj estas pretaj pagi tre altajn prezojn ke ebligu efektivigon de celantaj himeroj.

# KRALJEVIĈ MARKO (2)

## Tri renkontoj

### Rimarko

*En la informilo de Internacia Esperanta muzeo (IEM) el Vieno, n-ro 158, denove, kiel speciala numero, aperis libreto M. Abesgus: KRALJEVIĈ MARKO, tri originalaj rakontoj el la jaro 1896. Ni kredas ke rakontoj estas interesaj por niaj legantoj. En Antaŭparolo, interalie, pri rakontoj oni diris:*

"La originala rakonto "Kraljeviĉ Marko" de M. Abesgus pritraktas temon, kiu multe okupis la esperanlistojn de la unuaj jaroj: la antagonismo inter nacia sento kaj la kosmopoliteco de Esperanto. Fakte tiu-tempe naciismo ankoraŭ ne miskreditiĝis; por ceteraj etnoj ĝi estis fakte esenca en la akiro aŭ la konservo de sia identeco."

Vieno, 1991 04 30 Herbert Mayer

La "Enciklopedio de Esperanto" (Budapeŝto, 1933) raportas sur paĝo 13 jene pri la aŭtoro: "Abesgus M., ruso, bankoficisto, komence en Baku, poste en Teheran, kie li estis unua pioniro de E. Al lia plumo apartenas belaj originalaj skizoj pri Baku en "LI" [Lingvo Internacia] kaj originala rakonto "Kraljeviĉ Marko" premiita en la literatura konkurso de 1896."

*Kun permeso s-ro Mayer, donita al s-no Tereza Kapista, ni aperigos la rakontojn en venontaj numeroj.*

Originala rakonto sendita al la Juĝanta Komitato de la internacia literatura konkurso 1896 kaj honorita per arĝenta ĵetono.

\* \* \*

Ni vagadis preskaŭ du horojn en mallarĝaj, kurbaj stratoj, kuŝantaj proksime de Savo. Tie ĉi, pli ol aliloke en Belgrado, estas konservita la karaktero de l'antaŭa originala duonturka-duonslava urbo; tie ĉi ekzistas ankoraŭ multe da malnovaj konstruaĵoj, altaj kaj mallarĝaj, kies supraj etaĝoj superstaras la malsuprajn, en kiuj preskaŭ ĉiam estas butikoj; la strata vivo tie ĉi estas ankaŭ pli originala, pli nacia, ol en la novaj stratoj de l'supra parto de l'urbo. La malleviĝinta krepusko de mallonga vintra tago devigis nin fine ĉesigi nian migron, kaj ni decidis, ke antaŭ ol ni ekpaŝos laŭlonge de la kruta strato, kiu iras ĉefan arterion de l'nova urbo, ni eniru en la plej proksiman kafejon kaj manĝu ian nacian ŝumadian manĝaĵon. Baldaŭ ni trovis kafejon en malnova domo, super kies pordo estis pentrita militisto kun kurba glavo en la mano kaj surskribo ĉirkaŭe: "Kafejo de Kraljeviĉ Marko." Ni mendis nacian supon "ĉorba" kaj rostaĵon "ĉjulbasti" (manĝaĵoj, kiuj juĝante laŭ iliaj nomoj estis prenitaj de turkoj), kaj atendante ilin, ni mendis saligaĵon. Dum ni manĝis la alportitajn fiŝojn, la servanto bruligis la lampojn kaj eklumis nian tablon. Subite el la malluma, ankoraŭ nelumita angulo, sin levis belkreska homo kaj, veninte al ni, diris:

– Bonan vesperon, sinjoro!

Mi ekrigardis l'alveninton. Tio ĉi estis mia kantisto Marko Kraljeviĉ. Mi ne povis min deteni de ŝerco, kiu sin trudis al mi mem:

– Marko Kraljeviĉ ĉe "Kraljeviĉ Marko".

– Ruso manĝas rusojn, – ridetante respondis la kantisto.

Certe, la nepovo kompreni tiun ĉi respondon estis klare skribita sur mia vizaĝo, kaj mia akompani[i]sto – aŭstra serbo – rapidis klarigi al mi, ke fiŝoj, kiujn ni manĝis – malgrandaj haringoj de dalmatia bordo de l'Adriatika Maro estas nomataj rusoj.

Mia konato montriĝis ne sole kantisto-entuziasto, sed ankaŭ interesa interparolanto. Mi invitis lin sidiĝi kaj mendis ruĝan negotinan<sup>\*)</sup> <\*) Negotin estas urbo en Serbio.> vinon. Interparolante, mi sciiĝis, ke Marko Kraljeviĉ aperis en la kafejo per maniero tute natura: la mastro de l'kafejo estis lia frato. Aranĝinte la kafejon, li ĝin nomis kafejo de Kraljeviĉ sen ia ruza senco; sed poste oni konsilis al li ĝin nomi "kafejo de Kraljeviĉ Marko" kaj per tio doni novan signifon al ĝia elpendaĵo.

– Kredeble, sinjoro, vi nun jam pli bone scias nian lingvon, morojn kaj ankaŭ – kiu devas esti por ni Kraljeviĉ Marko? – demandis min la kantisto post la rakonto al ni la historion pri la nomo de l'kafejo.

– Jes, kompreneble, nun mi scias pli bone. Sed tamen mi devas konfesi, ke mi komprenas ne tute la nepran deziron de serboj, almenaŭ de ĉi-tieaj serboj, kiujn mi observas – formi ne nur unu nacion, sed ankoraŭ unu regnon, en kiun devas enflui ĉio, kio parolas serbe aŭ je simila lingvo.

Mi parolis certiĝinta, ke mi estos komprenita. Dum kelkaj semajnoj de mia loĝado en Belgrado mi konvinkiĝis, ke serba popolamasulo povas esti nur malmulte inteligenta je aliaj rilatoj, sed en politiko li staras en alteco de la nuna stato de ĉia demando.

Marko Kraljeviĉ ekridetis.

– Tiu deziro ekzistas sinjoro, ĉar la serboj jam havis iam regnon dum niaj antikvaj reĝoj kaj caroj (imperiestroj); ĝi jam estis kaj devas ree esti, kaj nun jam por ĉiam, ĉar ĉia nacio devas esti unuigita; nur antaŭ nelonge unuiĝis germanoj kaj italoj, kial do nia nacio ne devas esti same? Kaj mi kredas, sinjoro, ke tio ĉi estos, kaj por tio ĉi vekigoj Kraljeviĉ Marko, kaj...

Li subite eksilentis kaj reve direktis malproksimen siajn rigardojn, kaj en liaj okuloj mi rimarkis tiun flameton, kiu frapis min jam sur la vaporŝipo – la flameton de nenormala cerbo.

Mi ne volis daŭrigi la interparolon je temo, kiu, okulvideble, tiel impresis la malfeliĉulon, kaj mi penis transmeti lin je tezo malpli ŝovinista.

– Bone, ni supozu, ke la serba nacio estas unuigita, faras unu regionon – sed kio estos konkludata el tio ĉi? Ĉu oni devas trankviliĝi je tio ĉi?

La vizaĝo de Marko sin turnis al mi kun ia timigita nekompreneco en rigardo.

– Sed... kion oni deziru pli? Dio donu al ni atingi nur tion ĉi! Kaj, eble, tio ĉi estas jam proksima... Aŭdu, sinjoro, ekdiris li, mallaŭtiginte sian voĉon – Dio elektis siajn profetojn el paŝtistoj, kaj Kristo siajn apostolojn – el fiŝistoj... Kiu komprenos la signojn de Dio?... Kaj, eble, Kraljeviĉ Marko jam vekigis kaj iradas inter popolamasoj kun sia nomo aŭ kun la fremda – kaj atendas sian horon...

Bedaŭrinda, malfeliĉa homo! En via cerbo, videble, forte enradikiĝis la penso ke vi ne sole nome estas Marko Kraljeviĉ; vi kredas, ke vi estas alvokota por plenumi la mision de la legenda heroo, kaj vi eĉ ne estas konfuzata de penso – per kia maniero vi faros tion ĉi!

Mi ree ekpenis turni la interparoladon je alia temo.

– Vi demandas: kion oni deziru pli? Tion – ke jam nun la homaro celas unuiĝi ne sole nacie, sed tutare: ĉiuj homoj estu fratoj; kial ni celu en la komenco per glavo kaj sango fratecon en ĉia aparta nacio, dume estas ebla [= eble] pace laboradi por efektivigi la fratecon de ĉiuj homoj? Ĉu vi legis, Marko, en Jesajo...?

– Ne, sinjoro, legi... mi legas malbone, mi aŭdis, ke estis profeto Jesajo, sed mi neniam legis.

– Nu, ja en la libro de Jesajo estas sekvanta profetaĵo... Kaj mi penis traduki tiel proksime al la originalo, kiel tion al mi permesis mia scio de lia nacia lingvo – la glorajn inspirajn vortojn (Jesajo, II, 4):

– Kaj oni reforĝos el glavoj plugilojn kaj el ponardegoj rikoltilojn, ne levos glavon nacio kontraŭ nacio, kaj oni ne lernos pli militi.

Mi atendis de li rediron je miaj vortoj; tamen, al mia miro, li nelaŭte

ripetis post mi la vortojn de la profetaĵo kaj poste petis min diri ilin ankoraŭ unufoje; kredeble, ili frapis lin pli forte, ol mi povis supozi.

– Nu! ekdiris li nelaŭte – por tio ĉi la popolo ankaŭ povas bezoni Kraljeviĉ Markon.

Li sidiĝis sur benkon iom pli malproksime de ni kaj profunde enreviĝis; iafoje li ripetadis la vortojn, frapintajn lin.

Ni finis nian vespermanĝon.

– Bonan nokton, Marko!

Li, ŝajnis al ni, apenaŭ aŭdis nin en lia enreviĝo.

– Kun Dio! ekdiris li aŭtomate la laŭmoran serban "adiaŭ".





# Originala poezio

## У ЕГЕРУ

Има једно мјесто у сусједству,  
које увјек стециште је свијета,  
зато ово никоме не смета,  
ту се људи виде током љета.

Есперантски путеви му воде,  
пријатељском срцу они годе,  
а Мађари у тај градић зову  
да сви пјесму запјевамо ову  
и још љепшу пјесму одаберу  
кад нас опет виде у Егеру.

Мало мјесто, а велике чари,  
љепотом га природа обдари,  
свуда крошње, а још љепше цвијеће,  
ко то види заборавит неће.

## EN EGERO

El diversaj lokoj de la Tero,  
ni kunvenis en urbo Egero,  
en etoso de la verda spaco  
por komune kunvivi en paco.

Min akceptis la urbo kun stelo –  
kun bonveno de l' verda ĝemelo,  
freŝaero de Eger-montaro,  
E-lernejo kaj belkatedralo.

Ni babilis pri landoj, pri vivo,  
pri pli bela monda perspektivo  
kaj la lumo de la verda stelo  
nin kondukis al komuna celo.

Tagoj flugas kaj tempo forpasos  
sed la saman vojon ni surpaŝos  
kaj resonos el koroj la kanto  
en komuria lingvo Esperanto.

Dušan Tufegović

## U ARENI

Gitaro,  
smiri svoje strune.  
Neka trepere tiho,  
tako tiho da srca osete bol  
i tugu duboku.  
Krvari toreador u Velikoj Areni.  
Pogledaj: na licu mu  
još pobednički osmeh titra,  
al' suza hladna  
već gasi plamen u oku.

Plačeš li?  
Plači, lepa devojkó.  
Zastave su spuštene na pola koplja,  
oko tebe je mir.  
Pa ipak,  
zašto hrizanteme na borilište bacaš?  
Toreadora tvoga više nema,  
ali je Arena ostala,  
i već sutra objaviće fanfare  
novih boraca pir.

Vladimir Kirda Bolhorves

## EN ARENO

Gitaro,  
trankviligu proprajn kordojn.  
Lasu ilin vibri silente,  
tiel silente por ke koroj sentu doloron  
kaj malĝojon profundan.  
Sangadas la toreadoro en Granda Areno.  
Ekrigardu: sur vizaĝo lia  
ankoraŭ venka rideto vibras,  
sed larmo frida  
flamon en okulo jam estingas.

Ĉu vi ploras?  
Ploru, bela fraŭlino.  
Flagoj estas duonhisitaj,  
en via ĉirkaŭaĵo estas la paco.  
Nu, tamen,  
kial vi krizantemojn sur la batalejon ĵetadas?  
Toreadoro via pereis,  
sed la Areno postrestis,  
kaj jam morgaŭ anoncos fanfaroj  
festenon de novaj batalantoj.

Esperantigis  
La aŭtoro

# Tradukoj

**Simo Matavulj (1852-1908)**

## **BAKONJA FRAT'-BRNE (Bakonja fra-Brne)**

Tradukis en Esperanton Boriša Milićević

(Naŭa parto)

### **TERURO**

La monakoj kaj lernantoj komencis vagumi tra la krepusko en la preĝejo, ne kuraĝante disiĝi.

-Malfermu la pordegon! ekkriis fine Vostvoblvulo.

Apenaŭ ili vidis la tutan teruron!

Sur iu ajn altaro estis neniuj oraĵoj nek arĝentaĵoj, sanktaj donacoj misordigitaj kaj malpurigitaj, surplanke kandeloj, libroj, ornamfloroj....

La similan oni povis vidi nur en malnova tempo, kiam janiĉaroj rabadis.

Kriante pro teruro, ĉiuj amase ekiris antaŭ la ĉefan altaron. Oni forportis la oran kronon de sur la kapo de la Sankta Frane, kaj tri vicojn da grandvaloraj votaĵoj de sur lia brusto. Kvazaŭ tio ne esis sufiĉa, sed oni ankoraŭ traboris per tranĉilo unu lian okulon, kaj per karbo oni fulgumis haretaron de lia supra lipo! Krome, oni forportis de antaŭ li grandan lucernon kaj la tri malgrandajn, plue, oni forportis sube de li la oran skatolon en kiu konesriĝas la snktega komunimaco; plie, oni forportis la malnovecan kominiglason tute el oro, donacan kontribuadon de la Bosnia reĝo Stjepan Tomašević, kiun la monakoj iam alportis de tie; krome, oni forportis ses pezajn arĝentajn kandelabrojn, same malnovecajn; kaj oni forportis ... ĉion kio estis valora!

He, he, he! komencis Onklino.

He, he, iu diru ke tion ĉi faris la transriveruloj kaj niaj servistoj, kaj ne ortodoksulaĉoj! – diris Vostvoblvulo.

Ili direktiĝis por trarigardi la unuan altaron dekstre, sed tiumomente enkuris Ekskrementulo kun la etenditaj manoj, kaj poste li tri-kvarfoje svingturniĝis, kaj ekkuris al la pordego, kriante:

-Li mortis! Mortis! kaj li eksonorigis saltante uln-alten de sur la grundo.

Ili ekpensis ke la kuiristo subite freneziĝis, kaj ekiris al li, sed de la malgranda pordo allogis ilian atenton la lamentado de frat'-Brne, kiu kriantis de la vestiblo:

Nu eliru, eliru, vidu kio okazas al tiu!... Kiu ja kuŝas kvazaŭ morta?

Eliris ankaŭ Balgo al la vestiblo, vestitte per drapaĵo, kaj kriante:

-Kiu mortigis la monakon? Kiu pafmortis?

Tio estis la kompatinda monakejestro, kiu dorskuŝis, kun la blua vizaĝo.

Ĉiuj senkonsciiĝis, ĉiuj parolis samtempe, irante tien-reen ĉirkaŭ li.

Ekskrementulo senĉese sonorigadis, kriante ion.

Fine, Trogulo kaj Balgo komprenis ke ankaŭ la preĝejo estas rabita, kaj eniris ĝin, sed vidinte malbonegon ĉirkaŭ si, ili okulrigardis unu la alian, dubante ĉu tio estas sonĝo aŭ realo. Nun atentskuis ilin tumulto de la servantoj antaŭ la pordego, kaj ili ekiregis tien, sed ne povis eliri pro Ekskrementulo, kiu saltadis.

-Ĉesu tuj! – kriis Balgo, sed kiam la kuiristo ne obeis, li orelkaptis kaj flankenigis tiun, kaj komencis paroli al la servistoj:

-Kien vi volas ĉi-direkte?... Vi iru, kaj vi haltu...ne, sed iru ĉiuj , ĉiuj, unu tien, du ĉi tien! ...

-Por kuracisto al la urbo! aldonis Brne.

-Nu, kio estas denove? – demandis la muelisto.

-Kiel kio estas!? Mortis la monakejestro! ...

-La monakejstro mortis!

Haltu! ekkriis Vostvolvulo, alkurinte tiumomente. Ĉirkaŭiru en la monakejon! Kaj li forpuŝis la monakojn kaj la kuiriston en la preĝejon, riglis la pordon de interne, kaj eliris antaŭ ili en la korton.

Kiam la servistoj aliris de la alia flanko, denove iĝis malordo kaj kriado.

Do, la monakejestro mortis!? Kaj kiu diras ke oni rabis la preĝejon!? Nu, ni vidu!

-Reen! ekkriis Vostvolvulo, kaj vidinte ke li ne povas haltigi ilin, eltiregis la pafilon el zono de la muelisto, pafstreĉis kaj direktis ĝin al la amaso. Reen, hunda fiularo! Neniu moviĝu de ĉi tie, sed ĉiu min obeu!

-Iu donu al mi tranĉilon kaj alportu akvon! Ĉu vi ne vidas ke la viro estas mortinta! Duopo rapide alportu matracon el lia ĉambro. Donu tranĉilon aŭ poŝtranĉilon!

Vostvolvulo metis la pistolon je sia ŝnurego., kaj lerte distranĉis la sutanon de la monakejestro kaj altranĉis liajn brakojn duloke, poste li ŝprucigis akvon sur lin, kaj ordonis ke oni transportu lin en la ĉambron. Li restigis Virvulpon antaŭ la preĝeja pordo por gardstaradi, kaj li antaŭ la aliaj foriris en la monakejan "skriptorion" (skribejon), urĝe finskribonte du paperfoliojn.

Jen du leteroj, unu al la tribunalo kaj la dua al kuracisto. Do, kiu povas transnaĝi kaj trovi bonan ĉevalon transrivere, kaj galopiri al la urbo? Bonvolu, junuloj, ĉar mi donos tri talerojn! diris la nova provizora estro.

Ne pro talero, sed ... mi volas provi, se vi alvokos la transriverulojn por ke ili donu al mi ĉevalon! diris Dundak.

Mi pleje fidus Kruĉegulon diris la muelisto.

-Nu, vere, kie estas Kruĉegulo? ... Kie li estas? Alvenigu lin rapide! Strabulo foriris por serĉi lin.

Vostvolvulo kaj Onklino eliris antaŭ la junaj antaŭ la monakejon. La aliaj monakoj foriris al la monakejestro. Longe oni serĉis Kruĉegulon.

Kiu ja scias ke ĝuste li ne faris ĉi tiun tutan hontigaĵon! diris Dundak senvestigante sin. La bovisto estis liganta lan vestaĵon al stango.

-Vi estas ĉiam ŝercema, drinkemulo, diris Onklino. Sed mi estas ĝuste zorgema kio okazas al la kompatindulo!

-Oni ne devas zorgi pri lia kapo, ekleziuloj, diris la forĝisto. Kruĉegulo estas timema kiel kapro, sekve li ektimigis kaj kaŝis sin ien en la salikvergaro, sed elrampos post malsatiĝo.

Dundak eknaĝis, tenante per unu mano la stangon kun vestaĵnodego surpinte. Ĉiuj atendis ĝis kiam li transnaĝis, revestis sin kaj foriris en la vilaĝon. Pli proksimaj transriveruloj, kiel ni jam vidis, postiris Koleremulon kaj Korpulentulon laŭriverflue. Tiam Vostvolvulo ordonis al la restintaj kvar servistoj atenti ĉu tiuj kun Koleremulo altrenos la bestfloson, kaj se tio okazos, ili helpu, dum unu venu en la monakejon por sciigi lin. Poste li kaj Onklino foriris al la monakejestro.

Ĉiuj ses monakoj restis kelktempe ĉe la malsanulo, laŭ kies nura spirado estis rekoneble ke li estis ankoraŭ vivanta, poste restiginte ĉe li la lernantojn, ili foriris en la preĝejon.

Antaŭ la Sankta Jeronimo, oni ankaŭ forportis ĉion, sed lin mem la ŝtelistoj ne malbonformis.

-Estas videble ke ili havis respekton, ĉar li estas barbrfiĉa same kiel iu ilia monako! diris Vostvolvulo.

Sur la dua kaj la tria altaroj, la malpiuloj disboris la sanktajn Viĉencon, Perejron kaj Rokon. Kaj sur la kvara, kie estas pentrita la sankta Bernardo, genuanta kun la manoj levitaj al la ĉielo, la ŝtelintoj etendis liajn lipharojn de unu al la alia orelo, tiel ke eĉ Vostvolvulo ekridetis. Nu Dio mortigu ilin, kiel ili havis tiom da tempo por ludi! miris li.

-Ĉiaokaze oni eniris jam ekde vespero. Kaj ili ne estis malmultaj. Unuj forigadis ĉi tie, kaj la aliaj gardis la transportilon, dum ni interbabiladis en la porjunula kuirejo.

-Nu kio okazus se iu el ni estis elirinta? demandis Brne.

He, kio okazus! Ili ŝparus vian belan kapon! diris Vostvolvulo... Nu vere ni ne demandas nin: kien la antikristoj eniris, se ambaŭ pordoj estis fermitaj!

Jen opank-spuroj, diris Onklino. Mi delonge rigardas tion. Jen ili kondukas en la sakristion. Ni iru tien.

La sakristio flankeniĝis en la tombejon, kaj ĝia enirejo estas malantaŭ la ĉefa altaro. Ĉie ĉirkaŭe estis la malnovmodaj nuksarbaj ĉerkoj, plenaj de monakejaj objektoj kaj vestaĵoj; la ĉerkoj estis derompitaj kaj malordigitaj. La unika fenestreto, kiu havis ĝis tiam fortan feran kradon, nun staris malfermega.

-Do, ĉi tien ili eniris!

-Kiel ili povis eligi feraĵojn?

-Vi ne vidas kiel? diris frat'-Onklino. Tri, kvar antikristoj de ekstere subfosis per leviloj la strabetojn, kaj kune kun la transversaĵoj demurigis ilin. Kaj mi devas agnoski ke tio estas farita tre lerte, ĉar la muro de tiu flanko dispeciĝas kvazaŭ pano. Oni vidas, oni vidas ke ili ĉion antaŭe sciis kaj pripensis, sekve tion povis fari nur viro kiu pli longe ĉi tie restadis.

-Do, ree la suspekto devas fali je Stefano! diris Balgo, realtighante tiel ke li traigis la kapon tra la fenestron. -Nu jes, je mia animo, ĝuste kiel vi diras! Jen la krado tute sendifekta, dum tri trabetoj kuntenas sin reciproke, kaj la kvara estas dupecigita.

Post kiam ĉiuj laŭviciĝis rigardante tra la fenestro, ili revenis trarigardi ankaŭ aliajn altarojn, kiuj estis rabitaj kaj difektitaj same kiel la aliaj.

Tiel trovis ilin tagmezo.

-Kion ni faru nun? demandis Vostvolvulo... Pardonu, fraĉjoj, mi ne altrudiĝas kiel estro, sed, vidante ke vi ĉiuj perdis la saĝecon, pli ol mi, mi...

-Vi kondukis kiel vera viro! diris Onklino la unua. kaj mi dankas vin!  
Kaj ĉiuj komencis laŭdadi Vostvolvulon.

-He, kion ni faru nun? Jen la dekdua horo. Pri la mesoj kaj aliaj servoj ne povas esti parolo. Ni devas sigeli la preĝejon, ĝis venos komisiono el la urbo. Jen, mankas kaj la bestflosoj kaj ŝipoj...

-Ni iru ja, por ion manĝi. Nu, ĉu ni nun krevu pro malsato, diris Brne kaj foriris la unua.

Liaj kamaradoj sigelis la pordon kaj sur la fenestron krucmetis du bastonojn, poste atingis lin en la tagmanĝejo, kie Grgo elportis legomojn kaj sekajn fiŝojn.

-Do, li tamen prizorgis la tagmanĝon, nia diligenta Grgo! diris Betulo. Dankon!

-Kion ja fari, sacerdotoj! Dia volo estas ke homo devas manĝi dum sia vivo eĉ se io ajn okazos! Sed, kredis al mi, mi ankoraŭ ne rekonsciiĝis. Tiu ĉi terura evento forprenos al mi minimume kvin jarojn de la vivo! Kaj iu estis kvazaŭ animeca por tiri mian oreton! He, he...

Balgo komencis forte tusi.

-Tii-el! Komencis frat'-Brne. Kvin jarojn, vi diras! Mi eĉ konsentus pri la dek por mi. Mi ne scias kio kun mi okazos!

Mi ne zorgu pri via kapo, Brne! diris al li Vostvolvulo. Vi ne estas kormoleta, kvankam vi ne estas malbona viro! Sed gardu vin, por ke ... krak! ... vi scias, por ke ne krevu via vejno kiel ĉi-matene al la kompatinda frat'-Viĉe.

-Sed mi neniam multe trinkis.

-Vi ne trinkis, sed multe manĝadas kaj multe kuŝadas! Kaj vi mem diras ke ekde kelka tempo io pinĉas viajn piedodik-fingrojn. Tio povas esti podagro, kiel ĉe la mortinta frat'-Feliciano.

Ho, gardu Dio kaj Sanktega Virgulino! ... Kion vi parolas? .. Lasu ŝercojn kaj incitetadon je ĉi tiu fatala tago, je kiu la tuta kristanaro afliktiĝos ...

Strabulo venis.

-Jen oni trenas la bestflosojn kaj ŝipetojn! Plenajn je transriveruloj.

-Eĉ tio estas bona en ĉi tiu malbonego! diris Vostvolvulo leviĝante.  
Iru ni, fraĉjoj!



-Mi ja ne permesus al popolo veni ĉi tien hodiaŭ kaj morgaŭ! – rimarkigis Onklino.

-Kaj kiamaniere ni malpermesu al ili? ... En la monakejon ni povas ne permesi al ili, sed, finifine, estu ili antaŭ la porjunula kuirejo!

Deko da transriveruloj trenadis la bestfloson (ŝtelistoj dronigis la remilojn), plenan de homoj, inter kiuj estis Koleremulo kaj Korpulentulo. Kaj la ŝipojn forportis akvo.

Ĉion mi aŭdis kaj eksciis, ĉion ... kaj pri la preĝejo kaj pri la monakejestro! diris Koleremulo elirante pene. Mi ne plu povas! Estos bone ke ankaŭ mi ne perdos kapon. Mi iros tuj ekkuŝi. Ordonu ke oni alportu al mi kuiritan brandon en la ĉambron.

-Vere la viro havis tian aspekton, kvazaŭ li estus unu jaron malsana.

Post lin eliris Korpulentulo, ankaŭ penstarante piede.

La onklo ekiris akompani lin.

T-i-i-el! Almozulo, malbonulo, leprulo, abortulo, azeno de azenoj. Tiel, ĉu ne? Ke vi kuraĝiĝu! Ke vi havu tiun frenezulon kiel ekzemplon! Kion ankoraŭ mi ĝisvivus de vi, se mi tolerus vin apude! Sed tio ĉi estas la lasta interparolo inter ni! Jam morgaŭ diablo vin portu tien de kie vi venis, ĉar tiaj ne taŭgas por monakoj, sed por hajdukoj. Iru al la bando de Radeka, hajdukiĝu kiel iu ortodoksulaĉo, kaj rabadu preĝejojn kaj monakejojn.

Dume Korpulentulo ne prizorgis tiujn vortojn, sed prenis la sekan vestaĵon, kaj kaŝis sin malantaŭ la pordo por alivestiĝi.

Tiam Brne foriris en la kuirejon kaj ekpetis la kuiriston por forporti ankaŭ al lia nevo kuiritan brandon. Sed kiam ili du venis, Korpulentulo estis jam dormanta. Al frat'-Brne ne restis alio ol ke li ankaŭ ekkuŝu.

Dum la vespera krepuskiĝo, Trogulo vekiĝis iom pli bonvola.

-Leviĝu, Ive! ... Leviĝu, mia infano, kaj alportu akvon! diris li milde.

KorpuKentulo, tre mirigita, ekiris. – Al li ŝajnis ke unu jaro estas forpasinta, kaj ne unu tago, de kiam li lastfoje iris al la fontano; al li ŝajnis ke li transformiĝis en iun alian personon, kaj ke ĉio ĉirkaŭ li tute aliiĝis, - ke la monakejo estas multe malpli granda, same kiel la preĝejo, ke la rivero ĉirkaŭ la insulo estas larĝa kvazaŭ maro, kaj ke ĉirkaŭ la riverakvo, tute ĉirkaŭe, troviĝas iuj kolosoj, kiujn timas eĉ la sanktuloj en la preĝejoj, al kiuj eĉ la sankta Frane nenion povas fari, sed lasas ke ili lian okulon elfosu! ... Lin kaptis grandaj malĝojo kaj timo, kaj lia kredo konfuziĝis, tiel ke li ne sciis al kiu preĝi, ĉar le estis al kutimiĝinta turnadi sin rekte al Dio;

amare plorante, li ekdeziris subitan morton, la nevideblan morton, kiu svingforigus lin de inter malbonaj homoj, de ĉe malfortaj sanktuloj, kiuj ne kapablas eĉ sin defendi, kaj eĉ malpli lin mem! ...

Sed iom poste kaptis lin aliaj sentoj: li ekbedaŭris Frane-n, Jeronimon, Viĉencon, Perejron, Rokon, Bernardon, Dominikon, kaj Kristofon; li vidas ilin neniigitajn, sekve li ekbedaŭris ilin, kaj volis ilin konsoli, ĉar tiumomente ŝajnis al li ke li estas super ili... Poste li ektimegis pro tiu ekpenso, ĉar vidiĝis al li ke la sanktuloj tiel malbeligitaj estas pli terurigaj kaj "pli potencaj" ol ili estis antaŭe,,.

Ili ŝajnis sin trankvilaj, kaj atendas tempon, kiam neniu esperos venĝon, por subite ataki la malbenitojn! ekbrilis en lia menso, kaj lia sango ekardis pro furiozo, tiel ke li ekgrincigis la dentojn...

Nun li vidis sin mem en la monaka sutano sur la furioza ĉevalo, kun la nuda sabro enmane; post lin kunvenis la tuta kristanaro, kiom ekzistanta ekde la maro ĝis Kozjak kaj Velebit, ĉiuj, fraĉjo, kvazaŭ elektitaj fraŭloj, kavalerianoj kaj intanterianoj. La ĉevalo de Korpulentulo kvazaŭ ne tuŝs la grundon, sed fulmrapide ĉirkaŭflugadas tiun armeon, kaj Korpulentulo sur ĝi, tenante en la maldekstra mano krucon, en la dekstra sabron, kuraĝigas la kolerajn mititistojn, poste antaŭante ĉiujn, li transiris iun longan ponton, super iu larĝa rivero kaj instaliĝis sur unu vasta ebenaĵo. Tie li unue enordigis la armeon, poste subtende legis grandan meson, kiel iam faris frat'-Ivan Kapiŝtran kaj Ŝuriĉ Sinjor'-Stefano, antaŭ ol turkojn kurataki ("Poemojn" pri tiuj du herooj, kiel ilin verkis frat'-Kaĉiĉ, aŭskultis Korpulentulo plurfoje de Virvulpo). Poste la vojevodo Korpulentulo ree ekrajdis la bataleman rufan ĉevalon, kaj antaŭante la siajn direktiĝis al kolosoj. Ili marŝadas, marŝadas laularĝe, tiel ke la vasta kampo tondrobruas sub ili. Post kiam ili malproksimiĝis, la vojevodo ekmemoris ke ankaŭ frat'-Koleremulo estas inter soldatoj, kaj komencis serĉi lin, kaj trovinte lin, kise intersalutiĝis kaj tuj nomis lin estro de la maldekstra alo, Vostvolvulon estrigis al la dekstra, kaj li mem antaŭ ĉiuj. Poste la fortamaso ekmarŝis pli intense; sed post ioma distanco ili ekvidis altajn montarojn kaj sube de ili terurigajn kolosojn, kiuj disordigis batal-alojn, tiel ke ili apenaŭ trarigardeblis. Tiam malpliĝis la kuraĝo de soldatoj, kaj eĉ de la vojevodo. Li haltis kaj haltigis la armeon, kaj terurvoĉe forlegis preghimnon al la sankta Frane. Fininte la preĝon, li turnis sin al la malamikoj..., sed tie anstataŭ kolosoj, kion li vidis? La Bukovicajn mizerulojn kaj diboĉajn Kotoranojn!... Tiam la vojevodo rekuraĝiĝis kaj ekkriinte: "Sturmon al la ortodoksullaĉoj! li galopigis la

ĉevalon, kaj ĉiuj aliaj post lin.... Kaj la ortodoksulaĉoj "dorsturniĝis kaj fuĝantaj iĝis"...Dio kara, kio al ili okazas!... La kristanaro tranĉegadas ilin, piedpremadas, iliajn domojn kaj preĝejon detruadas kaj bruligadas, iliajn monakojn pendumadas je barboj...

Revenante de la fontano, Korpulentulo devis kompensi la tutan ellasitan gratetadon.

Malfrue dumnokte venis el la urbo "komision" ". Strabulo alvenis sciigi tion al frat'-Brne, sekve Korpulentulo eliris kun la onklo antaŭ la monakejon, kie jam estis atendantaj la ceteraj monakoj. Kvar fremduloj deĉevaliĝis, kaj Dundak post ili.

-Estas mirindege, kiel vi povis alveni! diris Vostvolvulo mansalutante la plej maljunan. Ĉiuj monakoj ankaŭ miris pri tio, kaj la juĝisto komencis fanfaroni ke ili galope venis el la urbo.

Korpulentulo prenis ledan saketon, kiun prezentis al li la juna sinjoro, barbrufa, malgrasa kaj vigla.

-Kiu estas ĉi-virkapreto? demandis Korpulentulo Dundak-on.

Tio estas kuracisto. Ŝajnas al mi ke li estas ortodoksulaĉo, ĉar li parolas same kiel ili.

La sinjoroj, "itale parolumante", eniris la monakejon.

-Kaj ĉi-avino estas – juĝisto! diris Korpulentulo rigardante deflanke la maljunan senlipharan malgrandetan viron.

-Kaj kiu estas tiu spinkurba ventregulo?

-Tio estas adjunkto, respondis Virkato. Oni diras ke li estas tre klera viro, scipovanta la latinan, same kiel frat'-Onklino.

Lin postiris la skribisto, alta, maldika, nerimarkinda junulo.

Betulo forkondukis "la komisionon" en la manĝejon, dum la kuracisto kun la ceteraj foriris al la monakejestro, kaj tuj malfermis lian fermitan okulon, kiu refermiĝis tuj post fingroforigo; poste li fermis lian alian okulon kaj ĝi per si mem malfermiĝis; poste li kaptis lian pulson, rigardante al sia horloĝo; fine li kuntiriĝis kaj demandis Onklinon:

-Ĉu tiu ĉi *viro*...? la medicinisto klinis dikfingron al supro de la lipoj.

Nu, jes, konsiderinde... iom eĉ tro se vi volas, respondis Onklino, kompreninte la mimikon.

\*\*\*\*\*

(daŭrigota)

*Karaj amikoj,*

*Okaze de la 55-jara datreveno de la morto de Risto Ratković, mi sendas por BVS mian tradukon de lia poemo IKONA, kun la persona noto de la elstara E-poetino Marjourie Boulton.*

Risto Ratković (1903-1955)

IKONO  
(Ikona)

Se mi vidas virinon ajn  
similan al vi:  
en mantelo cindrokolora kaj blankĉapelo,  
okazas ke mi surstrate ĝuste haltas.  
Kvankam mi scias  
ke vi delonge putras,  
ekpensas: eble vi estas.

Alie, vi scias:  
Je Dio ni neniel kredis,  
nek mi nek vi.  
Kaj vere ne rilatas al Dio ke  
mi volas  
al bildo via lucernon bruligi.

Esperantigis  
Boriša Milićević

Fakte el ĉiuj verkoj eble plej plaĉis al mi la ege simpla sed samtempe eĥanta subtila poemo IKONO, kiu efikas kiel kortuŝe universala.

La unuan de marto 1979.

*Marjourie BOULTON (El "Kolekto laŭdinda" okaze de VOĈO, n-ro 5/77, aperiginta tradukojn el jugoslavia literaturo).*

*Amike,  
Boriša*

# Historio

## **EL HISTORIO DE E-INSTRUADO – KIO ESTIS JAPE? ĈU DEVUS EKZISTI SAPE?**

Dum la XIX nacia kongreso okazinta en Niš inter la 4-a kaj 7-a de julio 1970, kunsidis, inter aliaj fakaj organizadoj, ankaŭ Jugoslavia Asocio de Pedagogoj Esperantistoj – konata JAPE, kies mi tiam estis prezidanto. La kunsidon ĉeestis pli ol kvindek partoprenintoj, inkluzive kelkajn gastojn kaj interesiĝantojn. Estas pridiskutitaj ĉefaj aferoj: JAPE laboro ligita kun organizaj demandoj, E-instruado kaj enkonduko de Esperanto en lernejojn.

Rigardante la agadon de JAPE oni konstatis ke en ĝi mankas precipe organiza formo de la laboro. Krom tio, JAPE preskaŭ restis ekster la movado, ĉar esperantistoj nepedagogoj, bedaŭrinde, ne alte taksis la rolon de JAPE. Pedagogoj unuopuloj, aliflanke, restis ekster la organizo kaj laboris sen iu ajn ligo kun la bazo. Kvankam iliaj laboro kaj sukceso estas laŭdindaj, tamen estis necese instigi ilian entuziasmon kaj kunigi ĉiujn fortojn por ke ni estonte ne restu sen iu ajn esperantlingve kapabligita instruisto. Inter aliaj organizaj demandoj oni decidis ke JAPE laboru en kadro de JEL kun la jarkotizo kiu inkluzivas la abonprezon por Internacia Pedagogia Revuo (IPR), kvar numerojn jare. El la faka laboro oni pridiskutis eblecojn de E-instruado en niaj lernejoj, instruprogramon, instrumetodojn kaj lernolibrojn. Por tio ĉi devis zorgi „Lerneja Komsiono, kies taskoj estis ankaŭ: disvastigo kaj enkonduko de Esperanto en lernejojn, aktiva kunlaboro en lernejaj reformoj de la lando kaj ĝenerala progresigo de lerneja fako de Esperanto. Oni tion devis solvadi je du flankoj: JAPE kapabligu instruistojn kaj „Lerneja komiso“ trovu leĝan vojon oficialigi E-instruadon.

Dum la pasinta periodo JAPE faris kontakton kun ILEI, enpagis al ĝi pere de JEL jarkotizon por konkreta numero de pedagogoj esperantistoj, daŭrigi la kolektadon de adresoj de pedagogoj esperantistoj. Pro tio JAPE ege petis ĉiujn gekolegojn turni sin al JAPE – Terazije 42, Beogrado – kaj sendi siajn adresojn por ke oni sciu pri ili, pri ilia dezirinda laboro kaj ke oni finfine pli bone organizu siajn fortojn je kampo de E-instruado en la lernejoj.

D-ro Miodrag Stojanović

## **Rezolucio de la 94-a Universala Kongreso de Esperanto**

La 94-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Bjalistoko de 25a de julio ĝis 1a de aŭgusto 2009, kun partopreno de preskaŭ 2000 homoj el 63 landoj en la jaro de la 150-a datreveno de la naskiĝo de la kreinto de Esperanto, Lazar Ludwik Zamenhof, kaj samtempe en la Internacia Jaro de Akordiĝo proklamita de Unuiĝintaj Nacioj, diskutinte la kongresan temon "Krei pacan ponton inter la popoloj: Zamenhof hodiaŭ", kaj studinte kun aparta atento la vivon kaj verkojn de Zamenhof, notinte la fakton, ke la urbo kaj regiono de Bjalistoko pli kaj pli rekonas la escepte gravan rolon, kiun Zamenhof ludis kaj daŭre ludas kiel monde rekonata figuro en la morala evoluo de la homaro, konsciante, ke tiu rekono konkretiĝis interalie en la malfermo de Centro Zamenhof fare de la urbaj aŭtoritatoj de Bjalistoko, kaj en propono, ke la Bjalistoka Universitato ricevu la nomon Zamenhof; memorigante, ke okaze de la 100-a datreveno de la naskiĝo de Lazar Ludwik Zamenhof Unesko rekonis lin kiel unu el la grandaj personecoj de la mondo, kaj ke tra la jaroj venis multaj similaj rekonoj pri la meritoj de Zamenhof kiel granda monda pensulo, kaj gratulante Unuiĝintajn Naciojn pro ĝiaj iniciatoj rilate al la ideo de akordiĝo, tiel esenca en mondo kiun dividas malakordoj pro antaŭjuĝoj kaj manko de toleremo, konstatas, ke

1. Per la internacia lingvo Esperanto, Zamenhof kreis unike efikan ilon de internacia komunikado sur neŭtrala bazo, sen favori unu popolon super alia, kaj sen favori unu etnan lingvon super alia, kaj ke tra pli ol 120 jaroj da uzado Esperanto pruvis sian taŭgecon kiel internacia lingvo plene adaptebla kaj adaptita al ĉiuj komunikaj bezonoj.

2. Tamen, Zamenhof samtempe komprenis, ke lingvo estas kolektiva posedaĵo, kaj konfidis la evoluon de sia lingvo al ties

komunumo de uzantoj, tiel ke Esperanto kaj ĝia kulturo fariĝis esence kreaĵo kolektiva, kiu evoluis en spirito de lingva demokrateco.

3. Tion farante, Zamenhof ankaŭ rekonis, ke utiligo de neŭtrala lingvo en la internaciaj rilatoj helpus konservi lokajn kaj regionajn lingvojn kaj kulturojn kaj la identecon de ties komunumoj.

4. Zamenhof ankaŭ signife kontribuis, per siaj verkoj kaj agoj, al klopodoj forigi la malamikecon inter la anoj de la diversaj religioj, al forigo de rasaj antaŭjuĝoj, kaj al rifuzo de milito kiel akceptebla maniero solvi disputojn – valoroj same gravaj en la nuna epoko kiel en la epoko de Zamenhof.

5. Sekve, Zamenhof plene meritas pli da atento ne nur kiel kreinto de lingvo sed kiel persono, kiu strebis al aŭtenta frateco inter la homoj surbaze de plena kaj reciproka kompreniĝo.

6. Tia frateco povas veni nur kiam la homoj interkompreniĝas en reciproka respekto – procedo, en kiu Esperanto povas ludi kaj jam ludas unikan rolon.

7. Interkompreniĝo estas esenca paŝo al tiu profunda kaj daŭra akordiĝo, kiu estas la celata idealo de la Internacia Jaro de Akordiĝo.

8. Akordiĝo eblas nur en situacio, en kiu lingvaj diferencoj ne formas baron al egaleca dialogo.

9. En tiu senco Esperanto estas unike taŭga kiel bazo por daŭra akordiĝo, kaj Universala Esperanto-Asocio, per sia atento ankaŭ al moralaj valoroj kaj al respekto de homaj rajtoj, povas signife roli en plenumo de la celoj de la Internacia Jaro de Akordiĝo.

# Memoroj

Antaŭ multaj jaroj

## MIA PATRO – ESPERANTISTO

*Nia zajeĉara membrino kaj esperantistino Vesna Ĝoniĉ dum la kongreso en Jagodino tralegis rakonton pri ŝia patro Dragoljub Tasiĉ. Li en Serbio komencis lerni en instruista lernejo, sed ne finis ĝin pro la milito. Li tion faris en Francio kaj poste studis agrokulturon kaj laboris en Novi Sad en tre gravaj ŝtataj funkcioj.*

*Ĉi tio estas tre interesa rakonto pri niaj unuaj esperantistoj kaj tre bela rememoro pri patro de Vesna. Jen ŝia teksto:*

"Mi dezirus tralegi al vi unu veran historion okazintan antaŭ multaj jaroj konsiderante ke ĉi tie estas ĝustaj loko kaj tempo por konatigi vin kun unu afero, kiu en nuna momento povus vekti nostalgion pri delonge pasinta tempo.

Mia patro mortis kvar monatojn antaŭ mia naskiĝo. La koro lin perfidis kaj li subite forlasis gravedan edzinon kaj gefilojn de dekkvar kaj dekunu jaroj. Tial mi kreskis sola kun miaj patrino kaj avino ĉar gefratoj jam estis studentoj en Beogrado.

Dum tuta mia vivo mi multe interesiĝis pri la patro. Ĉefaj aferoj el lia vivo mi eksciis el rakontoj de miaj proksimuloj, el patraj fotografiaĵoj kaj kelkaj postrestintaj leteroj, kaj plejmulte pri li mi povis trovi leginte lian taglibron kiun li skribis traŭrance Albanion kun "lernanta roto". En ĝi li priskribis multajn malfacilaĵojn, suferadojn, li skribis pri malsato kaj multaj danĝeroj kiuj konstante akompanis ilin, alveno al Solun kaj poste pri lia foriro al Marsejlo (vi, probable, rememoras la faman kanton: "Navigadas la ŝipo franca"). Poste pri lia lernado kaj studado en Francio, kaj pri aliaj aferoj kiuj multe interesis min. Ĝis nun mi gardas tiun kajereton kiel relikvon.

Tamen, krom ĉiuj tiuj detaloj, multon mi ne eksciis pri li. Sed iuj gravaj aferoj ne povas esti kaŝitaj por ĉiam, almenaŭ mi opinias tiel.

\* \* \*


Antaŭ tri monatoj mi estis en Beogrado ĉe mia frato. Sciante pri mia granda scivolemo rilate al la patro, li diris ke li hazarde trovis unu malgrandan memorlibron patran en kiu estas enskribitaj iuj tekstoj en



franca lingvo kaj mi povas vidi pri kio temas ĉar mi siatempe bone scipovis la francan. Mi foliumis iomete la paĝojn de la kajereto, kaj vidante kelkaj adresojn en Francio kaj kelkajn malfacile legeblajn francajn tekstojn kaj versojn, mi perdis intereson kaj pakis la kajereton en la kofron. Reveninte hejmen mi metis ĝin en bibliotekon inter miajn librojn kaj forgesis pri ĝi. Hazarde, se hazardo ekzistas vere, iun tagon mi denove prenis tiun malgrandan nigran kajeron por vidi pli atente kio troviĝas en ĝi. Nenio interesa, mi konkludis kaj intencis fermi ĝin, kaj subite ĝuste en la mezo de la kajereto, malfermiĝis unu paĝo, kaj antaŭ miaj malfermegitaj okuloj aperis jenaj, tiel bone konataj vortoj: "Kara samideano..."

Rememore kaj honore al tiuj malnovaj junaĝaj esperantistoj, kiuj havis volon kaj scivolemon lerni kaj akcepti novan lingvon, lingvon de paco, dum la Unua mondmilito furiozis fortoplene ĉirkaŭ ili, mi tralegos tiun tekston kiun dediĉis al mia patro, esperantisto, lia bona amiko, samideano, tekston kiu estis kaŝita en malgranda kajero naŭdektri jarojn."

*Jen kiel hodiaŭ aspektas la unua paĝo de la teksto en malgranda taglibro de sinjoro Tasiĉ:*



# Recenzoj

Libro de anonima aŭtoro

## POEZIO DE MALOFTA FORMO



Antaŭ nelonge aperis unu neordinara libro. Tute privata, sed bele ornamita kaj laŭ enhavo tute akceptebla. Tamen, neordinara, ĉar ni parolas pri sonetoj. Ne pri malmulte da sonetoj, sed pri 68 sonetoj verkitaj esperante.

Do, ni rememorigu tiujn kiuj forgesis: soneto estas konata metrika formo de itala literaturo, strikta kompono de 14 versoj, la unuaj du strofoj estas du katrenoj (po kvar versoj kun po du rimoj), kaj du strofoj estas tercetoj (po tri versoj kun unu rimo). Klasika soneto enhavas dekunu silabojn, sed poste verkistoj ne respektis nombron de silaboj kaj ĉi tiu poeto ne akceptis tiun normon, escepte

en dediĉo.

Eldonanto de la libro estas Etelka Kiŝ Jakupoviĉ (kun permeso de familio de la aŭtoro). Ŝi en enkoduko petis ke ni ne serĉu nomon de la aŭtoro kaj mi tion respektis. Estas domaĝo, ĉar tiu impona kolekto de sonetoj estas valora esperantista verkaĵo (aparte pro tio, ke serba esperantista literaturo estas malriĉa je originalaj verkaĵoj en internacia lingvo).

„Malfrua somero” verkis (mi reskribis titolpaĝon) „Malgajajn sonetojn”. Fakte, la aŭtoro (eldoninto diras en la antaŭparolo) jam estas en kampoj de eterne, li nun estas nur memoro, sed kiel jaroj pasas – precipe post apero de ĉi-kolekto de sonetoj, li postlasis al ĉiuj

esperantistoj ŝatatan poezion, aparte ĉi tiun raran poetan formon, vere belan rememoraĵon. Estas ankaŭ tiel kiam poetan verkon pritaksas legantoj de malvarma kapo, ĝenerale en jaroj en kiuj ili forlasis furiozajn amdezirojn.

"Malfrua somero" estas bela pseŭdonimo, kvankam mi, post legado de la kolekto, pli volonte utiligus pseŭdonimon "Malfrua printempo". En versoj estas pli da komenciĝo, naskiĝo kaj kreskado de amo. Somero estas maturiĝo, flamo, esplodo, ke la aŭtuno povu donaci al ni frukton. Sed tio ne estas grava, amo konas nek jarajn sezonojn, nek jarojn, ĝi ne havas pravigadon, nek kuracan atestilon, ne povas malvarme, science distingi kaj racie klarigi. Multaj libroj estas infanoj de amo. Amo estas tia – ĝi en homo ekmovas, vekas tion, kio en li estas plej bona, sed se ekamanto estas ankaŭ kreinto – tiam lia infano fariĝas objekto de intereso de aliaj. Ĉiuj amoj estas similaj kaj samtempe diferencaj (rememoru difinon de Tolstoj pri feliĉaj kaj malfeliĉaj familioj). Dafnid kaj Hloja, Vladimir kaj Kosara, Antonio kaj Kleopatra, Momir kaj Grozdana, Petrarka kaj Beatriĉa, Franc kaj Julija, Napoleono kaj Ĵozefina... mi ne deziras nombradi ĉiujn tiujn Adamojn kaj Evojn, kiuj fariĝis rakontoj kiuj restas vivi, provokas kompaton, larmojn, implikadas nin en siajn araneajn retojn de travivitaj aŭ nefaritaj amoj, donacas al ni sian travivaĵojn, malĝojojn, ĝojojn, sed tio tamen estas literatura travivaĵo, kiu nin ne lasas indiferenta.

Tiel estas laŭ tiu libro. Etelka kaj Anonimus, rememoro kaj pasinteco, dolĉa doloro pro nefaritaj deziroj, beleco de sentoj transferŝita en versojn. Araneaĵo de jaroj kovris ĉion kio ĝenis al amo, la amo el pasintaj jaroj nur ricevis guston de malnova vino kiu ne ekpikas palaton, sed alportas al ni belecon kaj fajron de junaj tagoj, fajron, kiu ne permesis al ni manĝi, dormi, dolĉan maltrankvilon, kiu nin, en amdoloro, faris feliĉajn kaj kreeme superecajn.

*La ĉiam torenta gajec-esprimo  
vualas la vivon plenan je dolor' –*

diris la aŭtoro en *Dediĉo*, kvankam tio per sonetoj li nur parte atestas, ĉar kiam virino estas "la fonto, komenco kaj fino de ĉiu pensero mia", ne ekzistas medikamento kiu tion povus kuraci. Amo faras, eble nia travivo diferenciĝas de tiu de la aŭtoro, nek nur nuda doloro, sed profunda, paca sed konstanta maltrankvilo kiu helpas kreadon kaj kies rezulto povas esti tia aŭ simila al la kolekto de poemoj. En la kolekto kiu tamen ne estas egaleca, ekzistas brilaj sonetoj, sed ankaŭ ordinaraj

taglibraj notoj. En iuj sonetoj ekzistas malpli bonaj strofoj faritaj pro aŭtoro deziro ke li devige respektu rimojn, sed estas bone ke tio ne okazis multfoje.

Estis kiel estis, mi ne deziras pli paroli pri amaj malfeliĉoj de la aŭtoro, sed diri pli pri la libro – ĝi estas verko de bona konanto de la internacia lingvo. Se mi ne parolas pri la granda laboro rilata al formo, kredis al mi, tre malfacile estis verki 68 sonetojn, respektante normojn pri verkado de ĉi tiu poeta formo, aŭtoro sukcesis ke, ne insistinte forte pri siaj amaj malfeliĉaĵoj, trovis sufiĉe da detaloj ke li sin ne ripetu. Kompreneble, ĉiam estas ĉeestanta doloro pri nerealiĝinta amo, ĉi tie ĉeestas mulfoje parka benko (kiu estis bele stiligita en titolpaĝo de Marjan Florŝiĉ) kun strata kandelabro kaj du oldaj arboj, kie komencis, mi tion atendis, idilio, sed idilio ne okazis, okazis nur unuflanka malfeliĉa amo.

Ĉio estis verkita poezie diference, en pli moderna stilo de internacia lingvo, pri kio multaj ne konsentas, sed mi mem ne nur akceptas pli modernan lingvon, sed mi pensas ke tio estas donaco al disvastigo de internacia lingvo. Lingva libereco kaj utiligo de malsimplaj vortoj, neordinaraj sintagmoj estas kontribuado al Esperanto.


En sonetoj la aŭtoro estas "feliĉa en sia ploro" kvankam li "ploras en / sia feliĉo", ĉar, kiel mi diris, se "la fonto, komenco kaj fino de ĉiu penso mia" estis virino al kiu sonetojn li dediĉis, tio estas tute komprenebla. Pro tio en li ofte okazas "ŝtormo anima" kaj lia vivo estas per "doloroj" superŝutita, havas "multajn demandojn", sed "respondojn li ne havas". En lia kapo ĉiam staras "okula belparo via", li sentas "senpovan mizeron", sed "konsolo ne estas". Li konkludas ke lia poezio estas "vantema", ke "pro streĉo mi preskaŭ svenis", al li estus konsolo "por gajni de via peceto", ofte "ĉi nokte mi dormi ne povis". Ĉe li, / "sed kiam fariĝis klare / ke mi vin pli ol adoras / pri via kunesto favoras / vi min nur tre avare". La poeto ĉiam estas en "amebria stato", li ne povas eksenti sin tuteca. De soneto ĝis soneto, ofte pli plore, ripetiĝas ploro, doloro, peto, vundo en animo, li trovas konsolon en sia ploro. Grave estis ke ido de tiuj amaj malfeliĉoj, ĉi tiuj nombraj sonetoj, kiel tutaĵo, reprezentas tre valoran donacon al originala Esperanto-poezio en nia areo. Tiam ni povus kompreni kaj pardoni al aŭtoro ke al li ŝajnas ke pro liaj malfeliĉoj "... l'aŭtuna ĉielo / el nuboj larmojn verŝas".

Min surprizis iuj eblecoj de Esperanto kun kiujn mi renkontis en ĉi tiuj versoj, sed kiujn mi pli / frue taksis kiel eblajn esceptojn. Tiel "dolĉpie", "amebria", poste vespero kiu estas "idilia", dum en kapo

"pensvago" kaj torakon lian disŝiradas "korflamo", lunon "nubeto vualas", lin ektrafas "korŝiraj sagoj". Mi komprenis "kunesto", sed pli malfacile ke poemoj "feliĉas", kvankam ĉio tio sonoras al mi lingve kaj gramatike regule. Min entuzmiazigis "korŝiro", kvankam mi aŭdis (mi ne scias ĉu tio estas regula) "kor-romp-ino". Aŭtoro diras ke lia korpo estas "korŝvebo", sed li ne havas "homforton" elteni ĉi tiun aman torturon, sed li sendas "memriproĉon" kaj finfine "gratulkison" kiu estis ricevita "nek nune nek tiam".

Konklude, mi estas kontenta pro apero ĉi tiu libro. Estus domaĝo se ĝi estus fininta en iu privata arkivo kaj estus perdita. Ĉi tia maniero, senkonsidere de anonimeco, ĝi estas bela temo por interparolo, maniero por ekzerci internacian lingvon, temo pri moderna utilo de nuntempa Esperanto, kiu devas disvastiĝi kaj ŝanĝiĝi. Domaĝo estas ke ne aperas pli da similaj libroj.

Dimitrije Janičić



Mi tralegis

## ĈU NI KONATIĜAS?

(Libro pri homaj rilatoj)

Ni komencu per unu afrika peto (Amadu Ampate Bu): "Vi pensas kiel mi, vi estas mia amiko. Vi ne pensas kiel mi, vi estas dufoje mia amiko, ĉar vi malfermis al mi novan mondon". Tion povus diri por libreto Mirejo Groĵan sub titolo "Afrukanoj kaj mi". Tiu penso estas skribita en tiu libreto (Eldonejo MIR, Les Brenets, Svislando, 2009).

"La mankoj je sekureco, nutraĵo, bona kuracado, bonaj lernejoj, komfortaj domoj, pureco kaj higieno estas gigantaj en Afriko", verkas M. Groĵan. Mi tion eksciis pli frue de sinjorino Tereza Kapista. Post ŝia restado en Afriko (Burundo) ŝi serĉis donacintoj inter esperantistoj por aĉetado de kaprinoj al burundanoj. Mi ne komprenis kiel kaprino povas helpi lernadon de Esperanto. Poste mi eksciis ke tio estis la plej bona helpo al esperantistoj en tiu burunda loko. Tio ebligas helpi al nutrado de malsataj infanoj, organizi kursojn, fondi novajn E-societoj. Burundanoj nomiĝis kaprinon Tereza kaj ĝoje sendis mesaĝon: "Tereza naskis du sanajn kapridojn". Mi ŝercis kun Tereza, sed ni estis ĝojaj ke tio helpis al multaj ŝiaj esperanto-lernantoj.

Antaŭ kelkaj tagoj ni ricevis tralegi libreton de M. Groĵan, kaj legante rememoris de Terezaj travivaĵoj el Afriko. S-ino Groĵan havas multajn kontaktojn kun Afrikanoj. Ŝi tre bone komprenis diferencojn de kulturkodojn kaj verkis libreton tre interesa por legado kaj utila por labori en Afriko, kun Afrikanoj. Post legado de tiu libro multaj aferoj fariĝis pli klaraj, kaj la malproksimaj afrikanoj – pli proksimaj. Ŝia libreto estas skribita per simpla, nedeviga stilo kun humuro pro neatenditaj okazaĵoj kiuj kaŭzis diferenco de kulturoj, estas tre amuza por legado. Sen ŝerco, libro apud ŝercaj rakontoj pri miskomprenoj, estas tre serioza apelo por helpi afrikanojn. Sed, se helpon oni donas al ili laŭ la normoj de nia eŭropa tradicio, eble helpo ne havos rolon kiun ni deziris. Oni devus koni afrikanojn kaj kondiĉojn de ilia vivo, devas scii multe pli pri ili. Inter ni kaj ili ekzistas multaj diferencoj. Sen konatiĝo de tiuj diferencoj malfacile estas organizi helpon, kunlaboron; Ĉu vi konis la proverbon (el libreto) "Eŭropanoj havas horloĝojn. Afrikanoj havas tempom". Tiu proverbo multe diras pri diferencoj. Ĉu vi sciis ke diri al sinjorino ke ŝi estas bovino

(Ruando) – ne estas insulto, sed estas komplimento? Se vi ne estas muzulmano, vi probable ne scias ke manĝaĵon oni ne prenas per maldekstra mano. Ĉu esti dika aŭ maldika? Kia estas rilato inter aĝo kaj vestaĵo? Invito de fraŭlino por viziti ŝian hejmon povus havi tute diferenca signifon. Ĉu fajfi kanton sur la strato? Ktp, ktp...

Aŭtorino verkas ke bezonatas interparoladoj, demandoj kaj respondoj, klarigoj. Se vi deziras viziti, aŭ kunlabori kun afrikanoj, estus bone, ke vi komencu per tralego de libreto de Groĵan. Mi certas – kunlaboro estos pli bona.

Dimitrije Janičić



# Impresoj

Jagodina

## RAKONTO PRI PARKO KAJ ESPERANTO

Dum La dua kongreso de serbiaj esperantistoj, partoprenantoj de la kongreso vizitis unu el la plej malnovaj parkoj en Serbio (kaj Eŭropo), parkon ĉirkaŭ Instruista fakultato en Jagodina. La parko enhavas ĉirkaŭ 220 specojn de diversaj plantoj sur surfaco de 1,67 hektaroj.

La unua direktoro, Sreten Aĝić, fondis la parkon de la Instruista lernejo kaj estis unu el la unuaj esperantistoj en Serbio. Li studis en Germanio kaj Aŭstrio, poste en skandinavaj landoj, kaj deziris ke lia lernejo, kiel similaj lernejoj en okcidentaj landoj, estu en bela, natura ĉirkaŭaĵo. Pro tio li de 1905 ĝis 1907, en surfaco ĉirkaŭ lernejo konstruis kaj preparis kvin lernoĉambrojn. Ĉiu lernoĉambro enhavas specifajn karakterizojn. En parko oni konstruis fruktoĝardenon, legomĝardenon, plantkulturejon de salikoj por lernado pri prilaboro de salikaĵoj ktp.

Plantojn sendis al li liaj amikoj el la tuta mondo. Inter plantoj en la parko ekzistas, ekzemple, ĉina ginko, amerika sekvojo, amerika blankfoliara acero, japana soforo, lebanona cedro, afrika tamariko ...

Estas interesa malĝusta rakonto pri tio kial Sreten Aĝić eklernis Esperanton. Dum balkanaj militoj pereis lia juna filo. La patro, trarigardante liajn librojn, malkovris lernolibron de la internacia lingvo kaj kajeron, kie lia filo ekzercis Esperanton. Kiel honoro al sia filo, Sreten Aĝić eklernis Esperanton, organizis la unuajn kursojn en la Instruista lernejo en Jagodino kaj tiamaniere faris bazon por lernado de Esperanto en tiu regiono. Nun jagodina Esperanto-societo portas nomon de Sreten Aĝić.

D. Janičić



SEN TITOLO (el reto)

## REF en MALI IĜOŜ

Estas nia lasta tago ĉe REF en Mali Iĉoŝ, urbeto en Serbio inter Subotica kaj Novi Sad, kaj mi tre bedaŭras tion. Jam kelkaj partoprenantoj adiaŭis kaj ni komencas senti nin "solaj, solaj, solaj...".

Dum mi matene kuŝas en la lito kaj aŭskultas la diversajn farmbienajn bruojn kiuj akompanis nin dum tiu 12-taga renkontiĝo, mi pripensas nun jam skribi miajn impresojn pri nia restado en Katai Farmbieno, dum ĉio estas ankoraŭ freŝa en mia memoro...

Alvenante en Serbion mi iom timis pri la temperaturo dum la aranĝo. Serbaj kolegoj miaj el Belgrado jam rakontis pri 42 grada varmeco la antaŭan semajnon! Fakte, ne necesis tiom zorgi. Krom la unua tago kiam estis ĉirkaŭ 37 gradoj, la venontajn tagojn ni ĝuis agrablan klimaton de inter 20-28 gradoj. Eĉ je pli varmaj tagoj, la grandaj arboj kiuj ĉirkaŭis la belajn lignajn konstruaĵojn kie ni restadis bone ŝirmis nin de la forta suno

Kia diverseco de partoprenantoj! Ni estas ĉirkaŭ 80 personoj el 14 landoj kaj mi tre ĝojas vidi 4 novajn familiojn inter ni. REF subite juniĝis ĉijare. Granda grupo de junuloj forlasis nin kaj nun transiris al junularaj aranĝoj kaj venis multe da familioj kun malgrandaj infanoj. 12 infanoj aĝis ses aŭ malpli! Por ili ne necesis multe da programeroj. Ili kontentis kune ludi en la granda aventura ludejo aŭ simple sidi en la ekstera polvo ĝis ili ĉiuj havis similbrunkolorajn vestaĵojn.

Por tiuj kiuj bezonis pli por okupiĝi, ĉiuj povis trovi ion kio plaĉis al ili (kaj se ne, ili devintus mem oferti ion alian!!). Manlaboroj estis tre popularaj ĉijare: oni lernis i.a. fari diversajn strukturojn el pajlo, sakojn el ŝaflano aŭ ledon, krei globetovojon el rubaĵo, konstrui domojn el kartono kaj konkursi per memfaritaj paperaviadiloj. Multaj knabinoj (inkluzive mian filinon!) kaj plenkreskuloj (mi!) treege entuziazmiĝis pri farado de brazilaj braceletoj kaj la kompatinda gvidantino de tiu kurso devis konstante porti kun si ŝnuron kaj tondilon (eĉ dum ekskursado) por ke ĉiuj povu satigi ilian bezonon de ŝnuraj ornamaĵoj (cetere tre praktika metodo okupi knabinon dum longa vojaĝo!)

Prelegoj estis abundaj kaj variaj, i.a. pri Urugvajo, ILEI seminario en Kongo, Esperanto en Serbio, lernu.net, springboard2languages projekto en Britio, ViVo (nova Viki-Vortaro kies nomo naskiĝis dum tiu REF), konsiloj por bona interpretado (plej grave: prepariĝu bone!) kaj eĉ

pri estonteco de la aŭtomerkato! Persone mi trovis ege interesa malfrunoktan diskutrondon pri lingva konduto. Tie ni interŝanĝis spertojn kaj opiniojn pri kiel la plurlingveco de niaj familioj estas vidata de nia rekta ĉirkaŭaĵo. La dilemo estas kaj restas kiel provi esti lingve ĝentila al nia medio (kaj ĉu tio necesas?) sen perdi la eblecon libere paroli, kaj tiel ankaŭ instrui Esperanton al niaj infanoj.

Alia diskutrondo priparolis la venontan REF. Estis diversaj proponoj sed evidentiĝis ke la plejmulto interesiĝis pri renkontiĝo en Kroatio. Plej verŝajne tio okazos iam dum la lasta semajno de julio aŭ la unua semajno de aŭgusto. La ĉeforganizanto esploras pli pri la diversaj eblecoj kaj informos ĉiujn pere de REF grupo fine de la aŭtuno. Por 2011 estis ankaŭ jam propono ke REF okazu en Svedio en domo posedata de esperantistoj kiu troviĝas en kamparo pli-malpli meze inter Oslo kaj Stokholmo (konsiderante ankaŭ ke ĝi povus okazi post UK en Kopenhago).

Niaj karaj REF-organizantoj, familio Csöke, senĉese laboris por ke la ĉijara REF estu sukcesa kaj pro tio mi tre dankas al ili. Krom la diversaj burokrataĵoj kiuj necesis pro serbaj leĝoj, ili zorgis ke ni ĉiuj sentu nin tre komfortaj en nia REF-oazo. Ili organizis i.a. ke la talentaj muzikistoj inter ni koncertu en la urbo, plurfojan vizitadon de banlago, ekskurson al proksima urbo Subotica, ekskurson al bestoĝardeno en Paci (verŝajne Palić, *rimarko de la redakta komitato*), ĉevalrajdadon por la infanoj, vesperan maizrostadon ĉe fajro, ekskurson al mielbieno kun mielgustumado, ekskurson al tradicia bakejo por mem baki panon ktp, ktp...

Tempo por enui ne estis, kaj se tio ne sufiĉis, tiam vespere ni ankaŭ tre ĝuis ŝercan kaj internacian vesperojn. Krome ankaŭ belis vesperaj rakontoj kie ĉiu infano mem povis kontribui proprajn ideojn dum gvidata rakontado. Ili decidis kiel la rakonto nomiĝu, kiu aperu en ĝi kaj kion ili faru. Ili ŝajne tre ĝuis tiun kreativecstimulan manieron mem krei kaj evoluigi rakontojn.

Pluse oni povis frue ellitiĝi por lerni gimnastiki kiel Tibetanoj, lerni tajĉi-on, partopreni en ŝakkonkurso, ludi indiaka-n (ludo inter flugpilko kaj badmintono), kartludi, partopreni en serĉludo, viziti la farmbienajn bestojn, kaj kaj kaj....

Por mi, la plej bela momento de ĉi tiu REF estis spontanea kaj ne rilatis al ajna programero. Koncernis mian 4-jaraĝan filon kiu ĝis nun ne pensis ke li kapablas paroli Esperanton, kvankam li pasive tute bone komprenas la lingvon. Je la komenco de REF li tute enamiĝis kun eta

urugvajanino. Kvankam ŝi estis ege ĉarma, ni iom timis ke tiu rilato detruus la esperantparoligan efikon de REF ĉar ili ambaŭ regas la francan. Feliĉe li poste ankaŭ amikiĝis kun kroataj kaj hungaraj geknaboj kun kiuj li nur povis komuniki esperante. Mi tiom ĝojis kiam post ĉirkaŭ 10 tagoj da REF mi aŭdis lin tute flue kaj klare klarigi esperantlingve al la aliaj knaboj la regulojn de por ili nova kartludo.

Ĉu jam fino de mia raporto? Ŝajne jes. Jam de longe la koko kikerikas kaj la azeno ia-as. Nin atendas unu lasta ankoraŭ tre plena tago da aktivaĵoj antaŭ nia morgaŭa foriro

Amike salutas vin Nikola Markarian (intertempe denove en Francio)



## NEFORGESEBLA TRAVIVAĴO

**De la 6a ĝis la 15a de aŭgusto 78 membroj de esperantistaj familioj el 14 landoj somerumas en Mali Iĝoŝ, en Serbio (Vojvodino)**

La 8-an de aŭgusto mi vizitis REF (Renkontiĝo de Esperantistaj familioj) en Mali Iĝoŝ, vilaĝo en Vojvodino. REF okazas en farmo Katai, farmo kiu specife estis preparita kiel lernejo en naturo. Tio estas tre konata infana natura ripozloko kun parko, ludejo, 15 diversgrandaj ĉambroj, kies ĉirkaŭaĵo estas preparita por ludo kaj lernado, por ĉiŭtaga aktivado.

Mi, kun Adem Jakupović, sekretario de Serbia Esperanto Ligo, lia edzino Etelka kaj konata Ĉe-instruistino Tereza Kapista alvenis vidi kiel funkcias la renkontiĝo. Ni portis malgrandajn donacojn al ref-anoj, kaj mi mem unuafoje vizitis familian renkontiĝon.

Farmo situas sur unu monteto, sur bordo de rivereto, en arbaro, en verdaĵo. Sur pinto de la monteto estas fruktoĝardeno, neordinaraj konstruaĵoj similaj al prahistoria vilaĝo, betonita vojo gvidas al akceptejo kie estas malgranda muzeo, vendejo, kafokuirejo. Kiam ni aliris al la objektoj de la farmo, videblaj estas nur turoj, ruĝaj tegmentoj kaŝrigardas el verdaĵo kaj inter arboj estas multaj vojetoj, kiujn faris infanaj piedoj. Paradizo por infanoj.

Betona vojeto gvidis nin antaŭ la akceptejon, malaltan konstruaĵon kun antaŭtegmento. Antaŭ ĝi estas tabloj kun seĝoj, ĉiuj faritaj permane el ligno. Dommastroj ne ĉeestas. El la verdaĵo elkuris okjara knabo. Li salutis nin "Bonan tagon", kaj forkuris ien.

– Momenton, knabo! – mi haltis lin. – Kie estas sinjoro Ĉoke? – mi deziris scii.

– Mi ne scias, mi rapidas en grandan salonon, nun estas tempo de kantado! – respondis la knabo kaj forkuris al granda konstruaĵo, el kiu mi aŭdis diversajn sonojn. Tie la infanoj kaj iliaj gepatroj kantis konatajn kaj nekonatajn esperantajn kantojn.

– Bonan tagon! – aperis bela brunulino el verdaĵo. Mi pardonpetas, mia edzo alvenos tra kelkaj minutoj!

Ni konatiĝis la dommastrino, sinjorino Ĉila Ĉoke, instruistino, virina parto de organizantoj de ĉi tiu la 31a REF.

– Bonvolu, sidu kaj atendu kelkajn minutojn. Ĉu vi deziras kafon? Tiel ĉion komencis.

Poste mi promenadis tra la objektoj de farmo Katai, interparolis kun partoprenantoj, aŭdis prelegojn de Boriŝa Miliĉeviĉ pri Vojvodino kaj Radojica Petroviĉ pri Kongo, kie okazis iu kunveno kaj seminario de ILEI, aŭdis kantadon de la partoprenantoj.

Sonorilon por tagmanĝo ni aŭdis je la 13a horo. Ĉiuj tagmanĝis kune en gasteja ĉambro, granda ejo en du niveloj. Ni estis tre kontentaj pro bona manĝaĵo.

Al mi tre simpatie sonoras diskutoj de infanoj, iliaj interparoloj, neordinaraj vortoj, iliaj klarigoj pri konatuloj el aliaj landoj, iliaj tre diversaj aktivecoj en libera, natura aero de la farmo. Ili kantas, promenadas, desegnas, interparolas, eble tie naskiĝas novaj amoj, novaj amikecoj, novaj kamaradoj, novaj spertoj. Ĉio estas en la signo de Esperanto.

Unuafoje mi aŭdis infanajn liberajn interparolojn, ilian pikparolon, aŭ ludojn per vortoj, kaj mi direkte povis konstati, ke Esperanto estas viva lingvo. Antaŭe mi aŭdis paroladojn dum konferencoj kaj oficialaj kongresoj de plenkreskuloj, sed unuafoje mi aŭdis infanajn interparoladojn dum ludo, kantado, manĝado... kiam ni vizitis 31an REF-on en farmo Katai en Mali Iĝoŝ.

Geinfanoj interparolis normale.

– Mi forgesis skribilon, mi petas alportu ĝin! – kriis unu infano al sia kamarado.

– Ne ĉikanaĉu! – Mi aŭdis tiun kanton pasintjare! – klarigis unu knabino al alia kaj ili denove tralegis iun kanton el libro *Kantareto* kiun portas ĉiuj partoprenantoj de la renkontiĝo.

– Ĉu vi deziras glaciaĵon? – demandas iu dekdujara knabo sian samjaran kamaradinon irante al vendejo.

– Atendu! Mi devas trinki akvon! – parolas kvarjara knabo al sia patrino apud fontano kun trinkebla akvo.

– Tio estas nia sepa REF kaj la dua, kiun ni mem organizas – diris al ni sinjorino Ĉila Ĉoke. Estas bele kaj bone vidi gajajn homojn en nia loko. Mi esperas, ke ĉiuj forveturos kun belaj impresoj kaj kun deziro reveni – diris ŝi.

– REF estas ĉiam parto de la someraj ferioj por nia familio, la plej ŝatata semajno de niaj infanoj – klarigas al mi Mariane Lund, Norvegino. Ni partoprenas jam la sesan aŭ sepan fojon, kaj certe partoprenos ankoraŭ kelkfoje. Dum REF la infanoj denove renkontas siajn amikojn kaj tutan tempon ludas kaj esperante parolas kun ili.

– Kaj plenkreskuloj?

– Gepatroj tre ĝuas la bonan etoson kaj la kunestadon kun ĉiuj infanoj kaj plenkreskuloj. Ĉijare venas pluraj novaj familioj. REF en Mali lĝoŝ (aŭ hungare Kiŝheĝeŝ) estas unu el la plej bonaj el ĉiuj, kiujn mi vidis – diris Mariane.

– Mi ankaŭ tre ĝojas partopreni ĉijaran REF – certas Ikar Akimenko el Rusio – tio estas mia dua REF. Mi ĉi tie estas kun filo David. Pasintjare la tuta familio ĉeestis, sed ĉijare nur mi kaj mia filo, ĉar vojaĝo estis tre multekosta, mi loĝas en Siberio. Mi aparte ŝatas REF, ĉar mia filo David tie trovis multajn amikojn.

– Jen estas mia unua REF, sed certe ne la lasta – diras Pedro Hernandez, hispana esperantisto kaj ipernitano, kiu ĉi tie estas kun edzino kaj filinoj. – Kondiĉoj por infanoj estas mirindaj, kaj mi kaj mia edzino estas tre kontentaj.

– Mi ne ŝercas – diris Radojica Petroviĉ el Serbio – ĉi tio estas mia unua REF same kiel por miaj genepoj Iva kaj Dag Mio. Mi ĝuas vidante la ĝojon de la infanoj kaj la entuziasmon de iliaj gepatroj. La gastigantoj kaj organizantoj meritas laŭdan dankon, kaj la aranĝo daŭrigon kaj plian atenton de la movadaj instancoj.

– La renkontiĝo de esperantistaj familioj estas por ni ĉiam la kulmino de la jaro – opinias Lars Sözier el Germanio. – Ni revidas niajn tre bonajn amikojn, kiuj krom Esperanton dividas kun ni ankaŭ multajn aliajn interesojn.

– Kion sentas viaj infanoj?

– Ili diras, ke al ili plaĉas partopreni en REF, ĉar ĉi tie ili povas esti tio kio ili estas, kaj ĉiuj ilin akceptas tiajn, kiaj ili estas. Al la ĉijara REF-ejo ni kun granda ĝojo revenis ĉar ĝi estas je multaj aspektoj perfekta loko por la aranĝo – konvinkite asertas Lars.

\* \* \*

Kvin horoj pasis rapide. Ni devis reveni hejmen en Beogradon. Ĉi tiun viziton al familia renkontiĝo mi ne forgesos. Tio estis interesa kaj bela travivaĵo kaj ankoraŭ unu konfirmo de la valoro de Esperanto.

Dimitrije Janičić

# Informoj

La 25a Universiado en Beogrado

## LA PLEJ GRANDA SPORTA OKAZAĴO

Inter la 1a kaj 12a de julio Serbio estis dommastro de la plej amasa monda sporta okazaĵo post Olimpikaj ludoj. Dum dekdu tagoj ĉirkaŭ 10.000 junaj sportistoj el 140 landoj konkuris en dek kvin sportoj kaj 203 sportaj disciplinoj. Tio estas konkuro de studentoj el diversaj mondaj universitatoj en diversaj sportoj, kaj oni ĝin nomas Universiado.

Por tiu sporta manifestacio estas konstruitaj dekkvar loĝejoj konstruaĵojn kun 1858 loĝejoj. Partoprenantoj de konkuro parolas 80 lingvojn. Al ili helpis 16.000 volontuloj, kies meza aĝo estas 22 jarojn. La plej multnobraj volontuloj (60%) estas junaj virinoj. Ĉirkaŭ 700 volontuloj estas eksterlandanoj.

Ĉi tiu sporta konkuro okupis serban ekonomion. Por partoprenantoj estis preparitaj 10.000 litoj, 7.580 tabloj, 17.000 seĝoj, ĉirkaŭ 6.000 ŝrankoj. Eĉ estis preparitaj 1.000 litoj pli longaj ol du metrojn.

Universiado estas jubilea – la 25a, ĝi signifas duonon de jarcento de universitataj sportaj mondaj konkursoj. Por sportistoj estis konstruitaj multaj novaj objektoj kaj multaj malnovaj estas rekonstruitaj. Interese estas, ke por sportistoj estas konstruitaj sep religiaj centroj. Tage por ili oni preparis ĉirkaŭ 45.000 porciojn de manĝaĵoj.

Insigno de Universiado estas malgranda eŭropa birdo – pasero, ofta birdo en Beogrado.



## NOVA SPERTO

En "Landa agado" mi tralegis pri invito por partopreno en amerika kongreso de Esperantistoj. En nia lando (Serbio) Interneto kaj skajpo ne estas tiel oftaj, aparte inter pli maljunaj homoj kiuj ne eklernis uzi komputilojn. Tiam mi skribis al la organizanto pri mia deziro partopreni kongreson skajpe. Organizantoj akceptis tion kaj difinis tempon por interparolado.

Intertempe mi tralegis kelkajn tekstojn el **Teleskopo** kaj konkludojn de s-ro Glosop pri 21a jarcento, kiel jarcento de tutmondismo kaj liajn opiniojn pri si kiel civitano de la tuta mondo, ne nur unu nacio, pri bezono de iu tuttera lingvo, kio estas ankaŭ mia opinio.

Tamen mi havis nenian sperton pri video-konferenco (skajpo konferenco). Mi salutis la kongreson dezirinte al ĝi sukcesoplenan laboron, diris kelkajn vortoj pri ni, pri Serbio kaj pri nia urbo Beogrado, vidis partoprenantojn de la kongreso, aŭdis saluton de la prezidanto kaj demandojn de kelkaj partoprenantoj.

Nova teknologio, aparte skajpo, estas, certe, nova ebleco por ni esperantistoj, kaj ni devas utiligi ĝin. Certe, oni bezonas novajn spertojn por utiligo de nova teknologio, kamero, lumo, tekniko. Sed, tio estas teknika problemo. Multe pli signifas eblecoj de novaj kontaktoj inter homoj, kiuj nun povas vidi unu la alian. Per skajpo kongreso en Sankta Luiso fariĝis internacia, kaj por mi mem, tio estis nova paŝo al kongresoj de aliaj landoj kaj ekzemplo kiel utiligi novajn manierojn de laboro. Pro tio verŝajne ni eniras en novan periodon de disvastigo de la tuttera lingvo, novajn eblecojn, novajn renkontiĝojn kaj novajn manierojn de laboro.

Mi raportis al miaj societanoj pri nova sperto kaj mi esperas ke verŝajne multaj esperantaj kongresoj estos utiligantoj de novaj teknologioj. Tio estos grava nova paŝo en disvastigo de Esperanto.

D. Janičić



UNU PROPONO

## LA NOVTIPAJ UEA EKZAMENOJ

Ĉi-jare, dum UK en Bjalistoko, UEA komencis organizi la unuan fojon novtipajn ekzamenojn laŭ la Referenckadro de Eŭropa Unio. Novtipaj ekzamenoj (A1, A2, B1, B2, C1, C2 enhavas tri laborkampojn: kompreno, parolo kaj skribo. Ekzamenoj estas akordigitaj laŭ la reguloj kiuj validas por ĉiuj lingvoj en Eŭropa Unio.

– Mi esperas ke nia Instituto akceptos tiujn eŭropajn regulojn, kvankam ni ne apartenas al Eŭropa unio – diris al ni **Jovo Ĝuriĉ Joĉjo**, kiu la unua el Serbio, dum UK, faris C1–ekzamenon laŭ novaj reguloj.

ESPERANTO SOCIETO SENTA

### **“VERDAJ AMIKAJ TAGOJ” EN SENTA de la 12.-a ĝis la 14.-a de junio 2009.**

Pretigon por nia tradicia renkontiĝo de esperantistoj “VERDAJ AMIKAJ TAGOJ” ni komencis jam en januaro. Okaze de la 150-a naskiĝdatreveno de la kreinto de internacia lingvo ni elektis la temon “ESTONTECO DE ZAMENHOFA IDEO”. Komence de monato marto ni anoncis konkurson por pentraĵoj kaj skribaĵoj sub titolo: “Ĉu ni ĉiuj estas homoj?”. Nia societo ricevis 62 pentraĵojn kaj 15 skribaĵojn en tri lingvoj: serba, hungara kaj esperanto, ne nur el Senta, sed ankaŭ el Subotica, Hajdukovo, Ostojiĉevo, Jazovo kaj el Plouezec en Francio.

Disdonadon de premioj por po tri verkaĵoj el ĉiu kategorio (de infanoj el infanĝardeno, por malaltaj klasoj de elementa lernejo, por pli altaj klasoj de elementa lernejo, por gelernantoj de mezlernejo kaj por plenkreskuloj) okazis la 25.-an de majo en la Elementa lernejo “11.-a de novembro” en Senta kun partopreno de lerneja direktoro Janjiĉ Dragiĉ. La solenan malfermon de ekspozicio partoprenis 129 homoj. La ekspozicio estis videbla por publiko dum unu semajno.

Tradicia renkontiĝo de esperantistoj en Senta “VERDAJ AMIKAJ TAGOJ” komencis la 12-an de junio. Post la akcepto de gastoj, je la 18-a horo la prezidanto de nia Societo, Siniŝa Veliĉkoviĉ salutis la gastojn kaj membrojn de Esperanto societo kaj deziris al ili bonvenon kaj

konstatis ke estas 20 partoprenantoj el Plouezec en Francio, kaj el Serbio el Subotica, Novi Sad, Beogrado, Niš, Kanjiĵa kaj Senta. Tuj poste Helene Caous el Plouezec en Francio tralegis sian verkaĵon en Esperanto, kiun ŝi sendis antaŭe partopreninte en nia konkurso. Siniŝa Veliĉkoviĉ transdonis al ŝi premion. Dum la interkona vespero Helene Caous prezentis la tradician renkontiĝon de esperantistoj en Plouezec en Francio, kiu okazas ĉiujare en aŭgusto.

La 13-an de junio estis unue prezentitaj tri prelegoj.

Siniŝa Veliĉkoviĉ prelegis en esperanto pri temo "ESTONTECO DE ZAMENHOFA IDEO". Poste Magdolna Revid prezentis en du lingvoj (esperanto kaj serba) vivon kaj verkaĵon de serba matematikisto kaj klimatologo Milutin Milankoviĉ.

Aranka Laslo el Subotica prezentis en tri lingvoj: hungara, serba kaj esperanto la tragikan vivon, suferojn kaj poetan verkaĵon de Mikloŝ Radnoti, hungara poeto. La prezentado estis teknike perfekte prilaborita kaj altkvalita.

Post la komuna tagmanĝo je la dua horo posttagmeze sekvis libropromocioj en kiu partoprenis: Velibor Simoviĉ el Beogrado, Boriŝa Miliĉeviĉ el Novi Sad kaj Laslo Husar el Kanjiĵa. Ili prezentis entute ses librojn.

De la dekseca horo sub gvidado de Atila Pejcin, direktoro de loka Muzeo la vizitantoj havis eblecon ekkoni la pasintecon de ĉirkaŭaĵo kaj ekspozicion pri Anne Frank. Pastro de ortodoksa preĝejo parolis ne nur pri konstruado kaj pentraĵoj sed ankaŭ pri historio de serboj en Senta de post la granda batalo kontraŭ la turka armeo en 1697.

Vespere interesitoj havis eblecon ĝui la koncerton de akordianoj en kiu partoprenis tri gelernantoj, du el elementa muzika lernejo el Senta kaj unu de meza muzika lernejo el Subotica kaj unu studento kiu studas en Sarajevo.

Dimanĉon laŭ la programo oni povis viziti la tombon de Tibor Sekelj en Subotica, en kiu partoprenis kvin ĉeestantoj.

La manifestacion monhelpis la loka komunumo el Senta. La uzadon de salono ebligis la Interurba organizo de surduloj. La loka organizo de Ruĝa kruco helpis en certigo de pli ol tridek premioj. Ni dankas al ĉiuj helpantoj kaj ĉiuj partoprenintoj.

La venontan mardon Esperanto societo Senta decidis, ke la renkontiĝo estis tre sukcesa.

Sekretarino  
Magdolna Revid

## ПОД ЗЕЛЕНОМ ПЕТОКРАКОМ ЕСПЕРАНТА

У пољском граду Бјалистоку почео 94. светски конгрес есперантиста којим се обележава 150 година од рођења творца „језика наде” Лудовика Заменхофа



*Заменхоф и зелена звезда есперантиста*  
(Фотодокументација „Политике”)

– Вавилонска кула није довршена због језичке пометње, њени градитељи нису могли да се споразумеју, а нас око 2.000 из седамдесетак држава, овде у Бјалистоку, настављамо с градњом куле есперанта, чије темеље је баш у овом пољском граду поставио Лудовик Заменхоф. Захваљујући њему и есперанту, споразумевамо се без тешкоћа. Говоримо истим језиком и настављамо градњу овог „језика наде”, који се данас користи у више од 130 земаља света.

Ова порука, коју смо у недељу примили од Александра Саше Пилиповића, есперантисте и глумца из Крагујевца, сведочи да у раду 94. светског конгреса есперантиста учествују и представници Савеза есперантиста Србије. Они ће од 25. јула до 1. августа обележити и 150 година рођења Лазара Лудовика Заменхофа (1859–1917), творца овог планског језика.

С још двојицом колега глумаца, Пилиповић ће за све учеснике конгреса – разуме се, на есперанту – извести и захтевну мултимедијалну представу рађену према роману Михаила Бронштајна, што ће бити његов десети, јубиларни наступ на светским конгресима есперантиста.

Своје представе играо је у Јокахами, Ротердаму, Варшави, Фиренци, Вилњусу, Пекингу и другим градовима, увек с великим успехом.

– Имам пријатеље у целом свету, опет смо се срели овде у Бјалистоку – јавља Пилиповић и наводи да у свету расте интересовање за есперанто, чему доприноси његова неутралност у односу на моћне језике света, поготово енглески, али и неки додатни, важни разлози.

Научне процене говоре да се данас у свету говори око 5.000 језика, док је њихов број свакако био већи пре 120 година, када је пољски лекар Лудовик Заменхоф измислио нови језик, једноставан и лак за учење, с речима које се истоветно или слично изговарају у

већини светских језика. Уџбеник тог планског језика потписао је као доктор Есперанто, што ће рећи „онај који се нада”.

Отуда је есперанто познат као језик наде, пријатељства и разумевања, отворен за развој и за пулс живота, што значи да се допуњава и богати као и сви други живи језици.

Заснован на лексичким и граматичким основама европских, у првом реду романских, језика, с једноставних 16 граматичких правила, есперанто се може савладати за неколика дана. Пошто је отворен за развој, Академија за есперанто сваке године усваја нове, међународно познате речи из разних области стваралаштва, науке и технике, тако да их сада у речнику есперанта има око 100.000.

Есперанто је неутралан и не даје предност било ком националном језику, али као помоћни језик у науци, култури, техници, уметности и другим областима, оснажује улогу националних, поготово „малих” језика. Зато је, примерице, есперанто у Мађарској добио равноправан статус са осталим страним језицима.

Испитивања обављена у низу земаља, у Великој Британији, САД, Финској, Мађарској, Немачкој, Италији и Русији, потврдила су да људи који су учили есперанто много лакше савладају и неки други језик. Зато и не чуди све снажније залагање на разним странама света да есперанто постане школски предмет као и остали, традиционални страни језици који се уче у школама. Уосталом, у политичким и бирократским лавиринтима већ неколико година се крчка предлог да постане и званични језик Европске уније.

Истраживачи документовано тврде да ће кроз двадесетак година од око 3.000 „малих” језика преживети једва њих 600, па отуда и све снажнији гласови да се спречи супремација било кога језика и да есперанто у том погледу пружа решење. Можда то још увек делује као занесењаштво, поготово зато што иза пропаганде и ширења есперанта не стоје ни средства ни моћ држава као у случају националних језика, данас поготово енглеског.

Упркос свему, према писању париског листа „Фигаро”, есперанто спада у ексклузивни круг од пет одсто језика којима у свету говори више од милион људи. При томе се број есперантиста брзо повећава, захваљујући Интернету, тако да они данас делују организовано у 135 земаља.

Слободан Кљакић

### **Одговора још нема**

Есперантисти су крајем прошле године предложили да једна улица у Београду носи назив *Есперанто*, али, иако је ово година њихових јубилеја, још нису добили одговор од надлежних градских органа.

Сл. К.

*Teksto publikigita en tagjurnalo „Politika“, la plej malnova en Serbio*

## **SUB LA VERDA KVINPINTA STELO DE ESPERANTO**

**En pola urbo Bjalistoko hodiaŭ komenciĝis la 94a UEA kongreso, kiu markas 150an datrevenon de naskiĝo de la kreinto de la internacia lingvo L. L. Zamenhof.**

– Babilona turo ne estis finita pro lingva konfuzo, ĝiaj konstruintoj ne povis interkompreniĝi, kaj ni, 2.000 el sepdeko da landoj, ĉi tie, en Bjalistoko, daŭrigas konstruadon de la turo de Esperanto, kies bazojn ĝuste en tiu urbo, starigis L. L. Zamenhof. Danke al li kaj Esperanto, ni interkompreniĝas sen malfacilaĵoj. Ni parolas la saman lingvon kaj daŭrigas la konstruadon de ĉi tiu "lingvo de espero", kiun oni nun uzas en pli ol 130 landoj en la mondo.

Ĉi tiu mesaĝo kiun ni ricevis de Aleksandar Saša Pilipoviĉ, esperantisto kaj aktoro el urbo Kragujevac, montras ke en laboro de la 94a UK-kongreso de esperantistoj partoprenas ankaŭ reprezentantoj de Serbia Esperanto-ligo. Ili de la 25a ĝis la 1a de aŭgusto markos 150 jarojn de la naskiĝo de Lazaro Ludoviko Zamenhof (1859-1917), kreinto de tiu planlingvo.

Kun ankoraŭ du aktoroj (la dua estas Miĉa Vrhovac, esperantisto el Banja Luka), sinjoro Pilipoviĉ por ĉiuj partoprenantoj de la kongreso – kompreneble en Esperanto – aktoros tre malfacilan multimedian prezentaĵon, preparitan laŭ romano de Mikaelo Bronŝtajn, kaj tio estos deka jubilea spektaklo de sinjoro Pilipoviĉ dum mondaj esperantaj kongresoj.

Li siajn prezentaĵojn aktoris en Jokohamo, Roterdamo, Varsovio, Florenco, Vilniuso, Pekino kaj aliaj grandaj urboj, ĉiam kun granda sukceso.

– Mi havas amikojn en tuta mondo, kaj ni denove renkontiĝis en Bjalistoko – diras Pilipoviĉ kaj diras ke en la mondo kreskas intereso por Esperanto, al kio kontribuas ĝia neŭtraleco rilate al grandaj lingvoj de la mondo, precipe al la angla lingvo, kaj ankoraŭ iuj gravaj kialoj.

Sciencaj estimoj indikas ke nun en la mondo oni parolas ĉirkaŭ 5.000 lingvojn, sed ilia nombro estis pli granda antaŭ 120 jaroj, en la tempo kiam Zamenhof kreis Esperanton, lingvon kiu estas simpla kaj facila por lernado, en kiu ekzistas vortoj kiuj estas same aŭ simile elparolataj en plimulto de mondaj lingvoj. Lernolibron li tiam subskribis kiel doktoro Esperanto, kio signifas "tiu kiu esperas".

Pro tio Esperanto estas konata kiel lingvo de espero, amikeco kaj kompreno, malfermita por disvastigo kaj por pulso de vivo, kio signifas ke Esperanto kompletiĝas kaj riĉiĝas kiel ĉiuj vivaj naciaj lingvoj.

Bazita sur leksikaj kaj gramatikaj bazoj de eŭropaj, unuavice romanaj lingvoj, kun 16 simplaj gramatikaj reguloj, Esperanton oni povas baze eklerni dum kelkaj tagoj. Ĉar Esperanto estas malfermita por evoluo, Akademio de Esperanto ĉiujare akceptas novajn, internacie konatajn vortojn el diversaj kampoj de kreado, scienco kaj tekniko. Esperanta vortaro nun enhavas ĉirkaŭ 100.000 vortojn.

Esperanto estas neŭtrala kaj ĝi ne donas avantaĝon al iu ajn nacia lingvo, sed kiel helpanta lingvo en scienco, tekniko, kulturo, arto kaj an aliaj kampoj de kreado, ĝi fortigas rolon de naciaj, aparte "malgrandaj" lingvoj. Pro tio, ekzemple, Esperanto en Hungario havas egalan statuson kiel aliaj eksterlandaj lingvoj.

Esploroj faritaj en multaj landoj: Britio, Usono, Finnlando, Hungario, Germanio, Italio kaj Rusio, konfirmis ke homoj, kiuj lernis Esperanton, pli facile lernas alian lingvon. Pro tio ne strangas propagando en diversaj flankoj de la mondo, ke Esperanton oni bezonus lerni en lernejoj kiel normalan studobjekton, kiel aliajn eksterlandajn lingvojn, kiujn oni tradicie lernas en lernejoj. Bedaŭrinde, en politikaj kaj birokataj lavirintoj jam kelkajn jarojn atendas la propono, ke Esperanto fariĝu oficiala lingvo de Eŭropa unio.

Esploristoj dokumentite asertas ke post dudeko da jaroj de ĉirkaŭ 3.000 malgrandaj lingvoj postrestos nur 600, kaj oni ĉiam aŭdas pli fortajn proponojn kiamaniere preventi supremadon de iu ajn lingvo kaj ke Esperanto estas por tio vera solvo. Eble tio ankoraŭ sonas kiel entusiasmigo, precipe pro tio, ke Esperanton subtenas nek rimedoj, nek potenco de ŝtatoj kiel ĉe naciaj lingvoj, hodiaŭ precipe la angla lingvo.

Tamen, laŭ franca "Figaro", Esperanto apartenas al ekskluziva rondo de kvin procentoj da lingvoj kiujn parolas en mondo pli ol unu miliono da homoj. Nombro de esperantistoj rapide kreskas, danke al interreto kaj ili nun ekzistas kaj organize laboras en 135 landoj.

Sen respondo

Esperantistoj fine de la pasinta jaro proponis ke unu strato en Beogrado nomiĝu "Esperanto", sed, kvankam tio estas jaro de ilia jubileo, ili ankoraŭ ne ricevis respondon de la urba registaro.

Traduko:

Dimitrije Janičić

# Esperanto-kurso

Бориша Милићевић

## *Konversacio*

aspekti	-изгледати	ĉar	-јер, пошто
teatro	-позориште	teatraĵo	-позоришни комад
kino	-биоскоп	kinejo	-биоскопска сала
multe	-много	ŝati	-ценити, волети
kiel	-како, као	tiel	-тако, онако
tiel ĉi или ĉi tiel	-овако	jen	-ево, ето, ено, гле
ĉiu	-свако, сваки, а, о	ĉio	-све
foriri	-отићи	certe	-сигурно
frukto	-плод	fruktoj	-плодови, воће
for	-напоље! даље; од- или от- (+ глагол)		

- Saluton, amiko! Vidu, vidu, bele vi aspektas hodiaŭ!  
-Mi aspektas, kara amiko, pli bele ol hieraŭ, ĉar mi vidos unu teatraĵon.  
-Mi ne ŝatas teatron tiel multe kiel kinon.  
-Diru kiel fartas via fratino. Ĉu vi havas novaĵojn?  
-Jes, ŝi volas veni kiel eble plej baldaŭ. Jen mi havas ŝian sendaĵon.  
-Salutu ŝin kaj diru ke ŝi posedas unu grandan pozitivan econ: ŝi komprenas ĉiun.  
Pro tio ŝi havas multajn amikojn.  
-Jes, ŝi estas tiel bona. Estas tempo ke mi foriru.  
-Ĝis la revido. Venu morgaŭ por ke ni lernu kune.  
-Bone, mi vizitos vin certe. Saluton.

## Proverboj

- Lernado sen fruktoj ne restas.      -Учење не остаје без плодова.  
Ne ĉio, kio brilas, estas oro.      -Није злато све што сија.

∴

## Префикс ек- означава:

-почетак радње у корену речи.

labori	-радити	eklabori	-почети радити
skribi	-писати	ekskribi	-почети писати
manĝi	-јести	ekmanĝi	-почети јести

**-тренутну радњу у корену речи.**

rigardi	-гледати	ekrigardi	-погледати
pensi	-мислити	ekpensi	-помислити

∴

**Префикс ге- означава пак:**

**-понављање радње у корену речи.**

vidi	-видети	revidi	-поново видети
fari	-чинити, правити, вршити	refari	-поново чинити, поново правити, преправити
formi	-обликовати, формирати	reformi	-поново обликовати, реформирати, реформисати

**-враћање у стање или место из кога се пошло.**

veni	-доћи	reveni	-вратити се
sendi	-послати	resendi	-послати натраг

**Као засебна реч гее значи опет, поново.**

**Сад нам је јасно да поздрав ĝis la revido, дословно преведен, значи до поновног виђења.**

∴

**Кад се дода на корен речи, суфикс –иј означава:**

**- Кутију, посуду за оно што је у корену речи.**

salo	-со	salujo	-сланик
mono	-новац	monujo	-новчаник, буђелар
kafo	-кафа	kafujo	-суд за кафу, цезва

**-Стабло плода или цвета у корену речи. Пошто истовремено може да значи посуду за плодове тог стабла, суфикс –иј се замењује овде речју –arbo (дрво, стабло).**



romo	-јабука (плод)	romujo	-јабука (стабло) и посуда за јабуке, стога <u>romarbo</u>
ĉerizo	-трешња (плод)	ĉerizujo	-трешња (стабло) и посуда за трешње, стога <u>ĉerizarbo</u>
piro	-крушка (плод)	pirujo	-крушка (стабло) и посуда за крушке, стога <u>pirarbo</u>

**-Када се дода на назив припадника народа, означава земљу, државу.**

serbo	-Србин	Serbujo	-Србија
hungaro	-Мађар	Hungarujo	-Мађарска
rumano	-Румун	Rumanujo	-Румунија
norvego	-Норвежанин	Norvegujo	-Норвешка

**-Ако је назив припадника народа кратак, обично се, уместо суфикса –иј употребљава реч –lando (земља).**

sviso	-Швајцарац	Svisujo или Svislando	-Швајцарска
polo	-Пољак	Polujo или Pollando	-Пољска

**-Посебно за означавање земаља са више народа и народности, уместо суфикса –иј употребљава се суфикс –i(o).**

jugoslavo	-Југословен	Jugoslavio	-Југославија
-----------	-------------	------------	--------------

**У новије време суфикс i(o) се употребљава и за друге земље.**

∴

(наставиће се)

# Amuzo

## STOJANAJ AFORISMOJ

*La sekvajn aforismojn, kaj multajn aliajn, verkis, serblingve, Stojan Nikolić el Jagodina. Ilin esperantigis Živko Ivanović, ankaŭ el Jagodina.*

Nian sorton determinas klanoj, klonoj kaj klaŭnoj.

Ili uzurpas ĉion, kaj ni havas nenion, kaj ili eĉ tiun nenion volas depreni de ni.

La Akordo estis daltona, ne Dejtona.

Balkano estas tertrema regiono: la plej granda eruptado estas koruptado (la plej grandaj erupcioj estas korupcioj).

Ĉe ili ĉio estas transparenta, escepte la maniero en kiu ili enriĉiĝis.

Ili verŝas krokodilajn larmojn pri la destino de la popolo, kaj havas banko-kontojn en Krokodila (Kajmana) Insulo.

Kiome virgaj estas la posedantoj de firmaoj en Virgin-Insularo?

Kia tragedio! Eĉ atingante montosupron, ĉevalo restas ĉevalo.

Se en la vivo oni respektus la kruelan regulon "tuŝita – delokita", multaj damoj ne restus maljunaj fraŭlinoj!

Se vi ne scias kiel venki kontraŭulon, tiam lernu kiel akcepti malvenkon.

Kiel mi vidu lumon fine de tunelo se niaj tuneloj estas labirintoj kaj katakomboj?

Kia paradokso! Tergloba varmiĝo, kaj, samtempe, frostiĝintaj funkcioj!

Malgraŭ la forfluado de la cerboj, ĉi tie multaj afektas saĝecon.

Kia absurdo! Militas en ĉiuj partoj de la mondo kaj ofertas partnerecon por la paco.

Balkano estas tropika regiono: nur tie sukcese elĝermadas banano-ŝtatoj.

Balkano estas la centro de la mondo: ĝi samtempe estas la Oriento de la Okcidento, kaj la Okcidento de la Oriento.

Por malvenko en partio ne kulpigu la ĉevalojn – kulpigu la rajdantojn.

El la Blanka kastelo ĉiam venas nigra destino por la popolo.

Unue ili enorme enriĉiĝis, kaj poste ili proponas al ni strategion kiel malgrandigi nian malriĉecon.

Ĉiu lando havas sian propran mafion; nur nia mafio volas sian propran ŝtaton.

Ili luktas kontraŭ la organizita kriminaleco, gardante la neorganizitan por si mem.

Antaŭe oni lasis maljunulojn morti sur montoj, nune emerit-hejmoj kaj maljunul-hejmoj sufiĉas.

Igi malriĉulon ŝpari egalas al igi malsatan dieti.

Pri kia konflikto de interesoj ili parolas? Ilin interesas ekskluzive iliaj propraj interesoj (ili okupiĝas ekskluzive pri iliaj propraj interesoj).

Aforismoj estas gnoma formo de literatura esprimado, bazitaj sur paradoksoj kaj absurdoj. Ili estas metaforaj, alegoriaj, aludaj, ironiaj kaj – sakrasmaj. La miaj estas ĝuste tiaj, ĉar la socia realeco volas ilin tiaj. Ilia celo estas brulmarki ĉiujn okazaĵojn kiuj kaŭzas devojiĝojn de la socia progresado, averti la regantajn aŭtokratojn, kiuj volas konservi sian "status quo", ke ili ne estas eternaj, ke la rondodanco de la feliĉo daŭre turniĝas, do, tiuj kiuj estis supre malsupreniĝas, kaj tiuj kiuj estis malsupre, supriĝas.

Stojan Nikoliĉ



La 62-a kongreso de IFEF,  
Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, okazos  
en Sofio (Bulgario)  
de la 8-a ĝis la 15-a de majo 2010

La 43-a konferenco de ILEI  
okazos en Matanzas (Kubo)  
en 2010 (de la 11-a ĝis la 17-a de julio?)

La 3-a kongreso de serbiaj esperantistoj  
okazos en Beogrado (Serbio)  
en 2010